

Biblia Revuo



Numero 5

1996

Redaktoro: Donald Broadribb

Melburno, Aŭstralio

Ĉi tiu ekzemplero de *Biblia Revuo* estas skanita teksto de la originala presaĵo, do preciza reprodukto. Nur la titolpaĝo kaj la tabelo de enhavo estis rekompostitaj en julio 2010. Eraroj kaj komposteraroj en la teksto restas nekorektitaj.

TABELO DE ENHAVO

La Genealogioj de la Ĉefpastroj en la Hebrea kaj la Samariana Tradicioj, de John Bowman	paĝo 1
La Alfabeto Kaozo, de Donald Broadribb	17
Provo de Transskribo de Du Semidaj Lingvoj (Hebrea kaj Araba) kaj de la Greka Lingvo, de A. Albault	25
Recenzo pri <i>Beginning Biblical Hebrew</i> , rec. A. Capell	36
Martin Buber, Edukisto, de S. Billigheimer	40
Edukado en la Antikva Proksima Oriento, de Brian Colless	49
Nelonga Noto: La Datoj de Jesuo, de Donald Broadribb	73
La Aŭtoroj	76
Indekso de <i>Biblia Revuo</i> numeroj 1-4	77

LA GENEALOGIOJ DE LA ĈEFPASTROJ EN LA HEBREA KAJ LA SAMARIANA TRADICIOJ

de John Bowman

Eĉ se antaŭ la epoko de Ezra la judoj neniam faris genealogiajn listojn — apenaŭ kredebla sugesto — lia malakcepto de “miksitaĵoj” nepre stimulis ilin serĉi kaj ekzameni siajn individuajn historiojn. Plejspeciale pastroj (pensu pri la agado de Nehemja rilate al Manase) strebus pruvigi sian devenon, kaj tiuj de siaj patrinoj kaj edzinoj. La libro Kroniko, eĉ se ni supozas ke ĝi estas el la jarcento post Ezra, ŝajnas speguli la pluvivon de tiu tendenco. Estante neakordanta grupo, la Samarianoj devus por protekti sin emfazi la purecon de la deveno de siaj pastroj. Ĉar la Samarianoj kredis havi tiom da frua izraela tradicio komune kun la Judoj, por ne detrui siajn proprajn pretendojn ili ne povis apartiĝi tro multe for de la formiĝanta aŭ formiĝinta tradicio pri la vera deveno de la ĉefpastroj, eĉ se la mano de Ezra kaj liaj simpatiantoj aktive reverkis la raportojn. Samtempe, oni supozus ke ili (simile al ĉiu disputanto ankaŭ post tiu epoko) kiam eble emfazus siajn diferencojn ĉe tiuj punktoj kie ili opinias la tradicion establitan malforta. Kiam ni komparas la judan liston de pastroj inter Aaron kaj la Ekzilo kun la listo de la Samarianoj por la sama periodo, montriĝas ke io simila al la aludita modifado efektive okazis. Oni devas, sendube, agnoski ke kiam oni parolas pri la aktuale ekzistantaj raportoj de la Samarianoj, eĉ la hebrea libro Kroniko estas relative antikva dokumento: ĉar la ekzistanta aŭtografajo de la Tolidah aŭ Šešelet-ha-Kohanim me-Adam ad ha-Yom konservata de la samariana Ĉefpastro en Nablus estas produktaĵo nur de la 14a jarcento p.K. Estas vere ke la parto pri kiu ni interesiĝas, de la 14a jarcento, estas kopio de 11-jarcenta originalo; sed eĉ konsiderante tion, se ni akceptas ke Kroniko verkiĝis ĉ. 250 a.K., inter tiu dato kaj la 11a jarcento p.K. estas

Hebrea kaj Samariana Genealogioj

giganta spaco. Tamen, estus malfacile kredi ke la samariana sekto, kiu ekekestiĝis inter 432 (kiam Neĥemja, kp. Neĥemja 13:28, forpelis unu el la filoj de la jerusalema ĉefpastro Eljaŝib ĉar li edziĝis kun filino de Sanbalat) kaj 332 (se ni kredas al Josephus kaj opinias ke la Samariana Eklezio fondiĝis tuj antaŭ la alveno de Aleksandro), ne provis respondi al la juda pretendo posedi la solan validan kaj puran pastraron per propra pretendo; kaj tiajn pretendojn oni devus subteni per genealogioj. Ju pli vastiĝis la skismo kaj Judismo kaj Samarianismo disiĝis, des pli stimuliĝis sendube la prilaborado de genealogioj. Ni scias ke tio okazis rilate al la Judoj, kiel indikas al ni Kroniko, kaj Pfeiffer plene pravas opiniante ke la verko de la kronikisto estis la unua apologio por Judismo kaj polemiko kontraŭ paganoj, speciale kontraŭ la Samarianoj. La verkinto de Kroniko devis ignori la tutan historion de la norda regno pro la pretendo — laŭ la Judoj, danĝera pretendo malakceptenda — ke la Samarianoj estas la posteularo de Izraelo, la vera Izraelo. Kroniko strebas malhonoru la historion de Izraelo kaj idealisme rigardas la historion de la regno Judujo, kies heredanto estis la juda komunumo en la epoko de Kroniko. Malgraŭ tio, kiam 2 Kroniko 13 malhonoras Jerobeamon kaj ties pastrojn, la kronikisto tamen ne neas la validecon de la pastroj de Izraelo antaŭ tiu tempo. Vere, implicita estas en la vortoj de Abija la deklaro de la kronikisto ke la samarianaj pastroj de lia propra epoko estas nevalidaj. Sed ĉi tie, kaj aliloke, la kronikisto ŝajnas sugesti ke la plej bonaj de Efraim speciale venis fojfoje al la juda komunumo. Ĉu tio estas respondo al la samariana proklamo ke la nepo de Eljaŝib konvertiĝis kaj akceptis la Samaritanojn? La pretendo de la Samarianoj pri Gerizim, ke ĝi kaj ne Ciono estas la sola valida adorloko, ja ĝenis la Judojn. La sektanoj, establinte alian centron kontraŭ Jerusalemo kiel la sola loko kie oni rajtas adori Dion, nepre devis pravigi la adoradon efektivigatan tie, kaj tio signifis pretendi absolutan validecon por ties pastroj, kaj nur ties pastroj.

La samariana Templo detruigiĝis en 128 a.K. Eble oni

rekonstruis ĝin post la ribelo dum la epoko de Hadrian. Sed la mesi-doktrino de la Samarianoj, kiu esperigas pri restarigo de la Tabernaklo, kuraĝigis la deziron kontinui la pastran linion sen makulo; ĉar kiam la Tabernaklo estos restarigita, pekardonon por Izraelo povos fari nur valida pastraro.

Kial la Samarianoj atendis ĝis la 11a jarcento por verki pastran genealogion? Jam longe antaŭ tio ilia Templo estis detruata. Raportoj delonge perdiĝis. Eĉ en la epoko de Baba Rabba (4a jarcento) la Samarianoj revigliĝis post jarcentoj da problemoj. Multa literaturo ilia estas perdita, sed iom restis kaj pli estas verkita. (Kp. la komentarion kaj himnojn de Marqa.) Pli da problemoj, eĉ pli severaj, trafis ilin poste, sed denove revigliĝo okazis en la 14a jarcento. Sufiĉaj tradiciaj raportoj restis por stimuli ilin. Oni ne povas nei la eblon ke Judismo inspiris ilin kaj ke ili adoptis kaj utiligis judan materialon. Sed estas neprobable ke, se tio ja okazis, oni atendis ĝis la 11a jarcento. Oni devas akcepti la eblon ke kaj la samariana kaj la juda kronikistoj egale uzis komunan materialon en la sama epoko, ni diru ke eble la 3a jarcento a.K.

Ni rigardu: ĉu tio estas kredinda? Ni komparu la koncernajn partojn de Kroniko kaj Tolidah. La juda genealogio de la ĉefpastroj plej komplete troveblas en 1 Kroniko 6:1-15. Oni evidente intencis, per tiu listo de ĉefpastroj, provizi nerompitan linion inter Aaron kaj Jehocadak (la lasta ĉefpastro antaŭ la Ekzilo), per Pinehas kaj Eleazar. La genealogio estas evidente ligita al tiu en Ezra 7:1-5 aŭ ĝia fonto. Ezra 7:1-5 provizas genealogion por Ezra de Aaron, per Pinehas kaj Eleazar. Estas du diferencoj inter la listoj. Ili akordas de Eleazar ĝis Merajot. Post tio, ses generacioj mankas en la listo de Ezra, t.e. Amarja, Aĥitub, Cadok, Aĥimaac, Azarja, Johanan. La listoj akordas inter Azarja (kiu sekvis Johananon, laŭ 1 Kroniko 6:10) kaj Seraja (1 Kroniko 6:14, Ezra 7:1). La dua manko en la genealogio de Ezra estas Jehocadak. (1 Kroniko 6:14.) Eble oni ne volis mencii Jehocadakon ĉar oni nomis lin patro de Jeŝua en Ezra 3:2; sed estas

Hebrea kaj Samariana Genealogioj

ankoraŭ pli malfacile supozi ke Seraja, la filo de Azarja, la antaŭlasta ĉefpastro antaŭ la Ekzilo estis la patro de Ezra. Rilate al la antaŭa manko, estas notinde ke Cadok, filo de Aĥitub, aperas dufoje en la ĉefpastra listo de 1 Kroniko 6:1-15, sed ni ne povas diri ke la Cadok de Ezra 7:2 estas la Cadok de la epoko de David kaj Salomono, ĉar oni listas lin kiel nur kvin generaciojn for de la epoko de Ezra; aliflanke, ni ne povas diri ke la ripeto de Aĥitub kaj Cadok en la listo de 1 Kroniko 6 estas nur erara ripeto, ĉar, kiel ni vidis, la dua mencio estas tiu trovebla en la genealogio de Ezra, kaj Cadok la filo de Aĥitub kaj patro de Ŝalum aperas en Neĥemja 11:11, en la genealogio pri Seraja de la epoko de Neĥemja. Ni notas ke la patro de Seraja estis Ĥilkija (kp. Ĥilkija, avo de la patro de Ezra Seraja) la filo de Meŝulam (kp. Ŝalum en la genealogio de Ezra) filo de Cadok (en ĉiu el la tri listoj). Sed Neĥemja 11:11 nomas lin la estro en la domo de Dio.

GENEALOGIA TABELO

<i>1 Kroniko 6</i>	<i>Ezra 7</i>	<i>Neĥemja 11</i>
Aaron	Aaron	
Eleazar	Eleazar	
Pineĥas	Pineĥas	
Abiŝua	Abiŝua	
Buki	Buki	
Uzi	Uzi	
Zerahja	Zerahja	
Merajot	Merajot	
Amarja		
Aĥitub		Aĥitub
Cadok		
Aĥimaac		
Azarja		
Johanan		
Azarja	Azarja	
Amarja	Amarja	

Hebrea kaj Samariana Genealogioj

Aĥitub	Aĥitub	Merajot
Cadok	Cadok	Cadok
Ŝalum	Ŝalum	Meŝulam
Ĥilkija	Ĥilkija	Ĥilkija
Azarja	Azarja	
Seraja	Seraja	Seraja
Jehocadak		
	Ezra	

Du el la tri listoj estas resumoj, speciale tiu de Neĥemja 11. Sed Aĥitub, estro de la domo de Dio en Ezra 7:5 kaj Neĥemja ne povas esti la Aĥitub kiu estis frato de Ikabod kaj nepo de Eli (1 Samuel 14:3). Konsiderante nun la unuan kaj ĉefan mankon en la listo de pastroj en Ezra 7, troveblan en 1 Kroniko 6:7-9, kaj listante ilin laŭorde: Pri Amarja ni nenion scias. Lia posteulo Aĥitub estis sekvata de sia filo Cadok. Oni kutime opinias ke tiu deklaro, ke Cadok estis la filo de Aĥitub, originis per eraro en 2 Samuel 8:17, kie ni legas ke la pastroj de David estis Cadok filo de Aĥitub kaj Aĥimeleĥ filo de Ebjatar. Konfirmas tion la fakto ke Cadok en 2 Samuel 15:17 estis patro de Aĥimaac. Krome, se la Aĥitub estas vere la Aĥitub kiu estis frato de Ikabod (kiel oni kutime supozas), estas tre strange ke oni prezentas lin, idon de Eli kaj per Eli de la Itamar-serio de pastroj, kiel prapatron de Cadok kiu estis (laŭ P) el la idaro de Pineĥas kaj Eleazar. Povas esti, malgraŭ P, ke ekzistis neniuj genealogio de Cadok kiu estis ĉie akceptata, kaj ke la kronikisto, kvankam honorante la cadokidan tradicion pri la prapatro Aaron per Eleazar tamen volis montri, sen atento al kontraŭdiroj propraj, ke la jerusalemaj pastroj ĝuis ĉiun honoron, ĉar la Samarianoj (kiel ni baldaŭ vidos) malakceptis Elin kaj ties idaron plene. Estus pli facile supozi ke oni opiniis ke Aĥitub estas alia ol la Aĥitub kiu estis nepo de Eli.

Aĥimaac ne estas problemo (v. 2 Samuel 15:27, 36), sed problemaj estas Azarja kaj Johanan. Ni rimarkas ke Azarja de 1 Kroniko 6:9 reaperas en verso 10, sed tie estas filo de

Johanan. La dua Azarja, patro de Amarja, estas en la listo de Ezra. Azarja, filo de Cadok, pastro menciita en 1 Reĝoj 4:2 estas tie nomita la pastro de Reĝo Salomono. En 2 Samuel 15:27 Aĥimaac estas filo de Cadok de la epoko de David, kaj Jonatan estas tie nomata filo de Ebjatar. Se ni supozas ke Johanan = Jonatan, do la listo de ĉefpastroj laŭ Kroniko inkludas idon de Ebjatar kaj sekve de Eli, do de Itamar en la genealogio de la cadokidaj pastroj, same kiel, ŝajne, pri Cadok mem, ĉar li faris lin filo de Aĥitub. Iukaze, ni devas opinii ke unu Azarja estas superflua nomo kaj ke la dua estas frato de Aĥimaac kaj, kiel li, filo de Cadok. Ni notas ke Azarja, pranepo de Cadok, estis la pastro en la templo de Salomono laŭ 1 Kroniko 6:10. Estas klare ke 1 Kroniko 6 prezentas 22 generaciojn de Ĉefpastroj de Aaron ĝis Jehocadak, t.e. laŭ la kalkulsistemo de 1 Reĝoj 6:1, ke de la Eliro ĝis la Templo pasis 440 jaroj, kaj de tiam ĝis (ni supozas) la Ekzilo 380 jaroj (se oni fondis la Templon en 967), do sume 820 jaroj, t.e. po 37 jaroj por ĉiu pastro. Tio estas tre nerealisa, kaj iukaze oni ne agnoskus nur unu ĉefpastron kiel superan. Diversaj ador-lokoj havis proprajn pastrojn, kaj tiuj pastroj probable estis idaro nek de Eleazar nek de Itamar. David, laŭ 2 Samuel 20:26, nomis Iran, el Manase, tribo Jair, pastro, kaj nenion oni en tiu verso diras pri Cadok kaj Ebjatar.

Kiam ni ekzamenas la ateston de la Samarianoj, ni trovas ke ili forte insistas ke ilia Ĉefpastro estas ido de Eleazar, el Aaron, ĝis Uzi; kun unu escepto, ili akordas kun la listoj en 1 Kroniko 6 kaj Ezra 7:5. La escepto estas ke ili nomas Ŝiŝin filo de Abiŝua, kaj ke Buki estas ne la filo sed nepo de Abiŝua. Post Uzi la listoj apartiĝas.

GENEALOGIA TABELO

<i>1 Kroniko 6</i>	<i>Samariana listo</i>
Aaron	Aaron
Eleazar	Eleazar
Pinehas	Pinehas
Abišua	Abišua
	Ŝiŝi
Buki	Buki
Uzi	Uzi
(7 generacioj pli)	(5 generacioj pli, malsamaj nomoj)
Johanan	Jonatan
	Jair
	Dalja
Azarja	Jair
Amarja	Jonatan/Johanan
	Iŝmael
Ahitub	Tobija
Cadok	Cadok
Ŝalum	Amram
Hilkija	Hilkija
Azarja	Amram
Seraja	Akub
Jehocadak	Akabja

De Aaron ĝis Uzi la Samarianoj havas ses generaciojn de pastroj, dum la judaj listoj (1 Kroniko 6 kaj Ezra 7) havas nur kvin. De Uzi ĝis Jonatan, kiu (laŭ la Tolidah, eldono de Gaster) estis en la epoko de David, la Samarianoj trovas ses generaciojn. Tiu Jonatan de la samariana listo memorigas nin pri Jonatan filo de Ebjatar, kiun ni konsideris egaligi kun la Johanan de la listo de Kroniko, kiu estis antaŭ la Azarja de 1 Kroniko 6:10 kiu estis pastro en la domo konstruita de Salomono en Jerusalemo. Se tiel, do Kroniko trovas ok generaciojn ĝis la epoko de David. Iukaze, la samariana listo

estas tia ke la tria pastra generacio post la Jonatan de la epoko de David estas en la epoko de Salomono. La samariana pastro estis Jair, kaj la Tolidah notas "dum lia epoko Ŝela konstruis la Templon en Jebuc" (t.e. Jerusalemo). Oni rimarku ke tiu Jair estas en la naŭa generacio post Uzi, kaj simile Azarja filo de Johanan estas en la naŭa generacio post Uzi, laŭ la listo de Kroniko, kaj li servis en la templo de Salomono laŭ 1 Kroniko 6:16.

Efektive, la samariana listo nomas inter Jonatan kaj Jair pli fruajn Jairon kaj Daljan, tiel ke la generacioj inter Uzi kaj la epoko de Salomono preskaŭ paralelas. Se la Jonatan de la samariana listo, laŭdire de la epoko de David, vere estas konektebla kun Ebjatar, ni trovos la saman fenomenon en la samariana listo kiel en la juda: oni mencias idon de Itamar, eĉ kvankam tio estas nekredible pro la deklarata antipatio de la Samarianoj kontraŭ Eli, kaj ilia deklaro ke la juda pastraro estas nevalida pro sia deveno de (laŭ ilia diro) Eli. Sed oni povas demandi kiam la cadokida, kaj sekve eleazara, pretendo estis farata unufoje? Se antaŭ ol okazis la samariana skismo, do estas kompreneble ke la Samarianoj konservus ĝin. Kaj ili kaj la Judoj insistus ke la propra pastraro estas vera idaro de Cadok, sed la Samarianoj ne povis tro diferenci de la Judoj rilate al la geneologiaj listoj. Restas respondende, kial la samariana pastro (Jair) de la epoko de Salomono (laŭ Tolidah-Gaster) ne estas renomita laŭ la juda pastro de tiu epoko? Sed la respondo estas evidenta: Azarja estis pastro en la domo kiun konstruis Salomono en Jerusalemo. Neniu Samariano povus fari tion; sed eĉ David povus, laŭteorie, adori sur Gerizim. Rilate al la samariano Jair, da kiuj ni konas du, ĉu la Samarianoj eble konis la tradicion en 2 Samuel 20:26 pri Ira la Jairano el Manase, kaj konservis fuŝitan tradicion, sen kronologia ĝusteco? Samtempe, oni emas demandi ĉu Johanan filo de Ebjatar, ne en la listo de Ezra, eble estis el tradicio konservata de la Samarianoj, Johanan ne nepre el la idaro de Itamar. Estus preskaŭ pli facile kredi tion ol ke la filo de Ebjatar estis mismetata en cadokidan

liston de pastroj.

De la Jair de la epoko de Salomono estis 9 generacioj de samarianaj ĉefpastroj ĝis Akabja kiu estis (laŭ la Tolidah eldonita de Bowman kaj de Gaster) kaptata de Nabuhadonator aŭ Bohtanasar (Tol.Gas.). En la listo de 1 Kroniko 6 estis 8 generacioj inter Azarja de la epoko de Salomono ĝis Jehocadak kiu estis ekzilata de Nebukadnecar. Tiun ekzilon nomas la Tolidah (Gaster) la Unua Ekzilo, kaj nek la Tolidah (Bowman) nek la Tolidah (Gaster) konas pli fruan ekzilon. Ni do konsideras judan sekton kiam ni konsideras la Samarianojn. Estas do ne surprize ke ni trovas kontakton inter la nomoj de la samarianaj kaj la judaj pastroj kiuj laŭdire estis ĉefpastroj post la fondiĝo de la templo de Salomono.

La posteulo de Jair laŭ la samariana listo, de la epoko de Salomono, estas lia filo Jonatan (Tolidah-Gaster) aŭ Johanan (Tolidah-Bowman), dum la pastro de la epoko de David, Jonatan, havis kiel posteulon Jair. Ne estas malprobable, kiel jam notite, ke oni "korektis" la generaciojn kaj plenigis la liston per ripeto de la nomoj Jonatan kaj Jair kaj enmeto de Dalja inter la du Jairoj por plenumi ian kronologian skemon. La dua Johanan/Jonatan estas sekvata de Iŝmael, kaj li de Tobija. La Tolidah diras ke Tobija estis la lasta Ĉefpastro kiu loĝis sur Monto Gerizim, kaj lin mortigis araboj. Ne estas klare ĉu tio estas fuŝita aludo al la konkeriĝo de Izraelo; se jes, do jen la sola aludo, kaj ĝi estas erara kronologie eĉ laŭ la samariana skemo. Lia filo Cadok sekvas. Kiam ni rimarkas la liston de 1 Kroniko 6, kaj de Ezra 7:1-5 kaj Nehemja 11, ni trovas Cadokon, la filon de Aĥitub. Oni emfazas tiun Aĥitubon, speciale en Nehemja 11:11 kie lin oni nomas prapatro de Seraja, pastro samtempa kun Ezra, kaj kie oni nomas lin estro en la domo de Dio. Krome, la geneologio de Seraja estas donata nur ĝis Aĥitub. Se Aĥitub, la patro de Cadok de la judaj listoj, estas sama kiel Tobija patro de Cadok, ni do havas du sinsekvajn generaciojn en tiu post-Salomona sed antaŭ-ekzila parto de la pastraj listoj, juda kaj

Hebrea kaj Samariana Genealogioj

samariana, kiuj indikas kontakton inter la kompilintoj. Kial la judaj fontoj elektis tiun Aĥitubon kaj ellasis kelkajn famajn pastrojn menciitajn en 1 kaj 2 Reĝoj dum tiu epoko estas nekomprenebla. Cadok en la samariana listo estas sekvata de sia filo Amram, kaj en la juda listo de sia filo Ŝalum (Meŝulam laŭ Neĥemja 11:11). Ŝalum, de la juda listo, kaj Amram de la samariana estas sekvata de Ĥilkija. Probable oni celas paroli pri la Ĥilkija de la epoko de Joŝija. Ĥilkija limigis adoradon al la templo en Jerusalemo. La samariana listo kompreneble ne emfazas lin. La samariana listo poste diferencas de la juda, kaj ni trovas la nomojn Amram anstataŭ Azarja post Ĥilkija (Azarja ne estas menciata en la listo de Neĥemja 11:11) kaj Akub anstataŭ Seraja kiel de la antaŭlasta pastro antaŭ la ekzilo, kaj Akabja anstataŭ Jehocadak kiel Ĉefpastro ekzilita de Nebukadnecar en Babilonion.

Ĥilal estas la samariana pastro dum la Ekzilo, kaj lia filo Seraja revenas kun la popolo post la Ekzilo (Ezra 3:2). Jeŝua estas la Ĉefpastro de la reveno. Seraja, la filo de Azarja kaj nepo de Ĥilkija, interesas nin. En 1 Kroniko 6 li estas la antaŭlasta pastro antaŭ la ekzilo kaj estas avo de Jeŝua; en Ezra 1, li estas la patro de Ezra. En Neĥemja 11:11 li estas samtempa kiel Ezra kaj la filo de Ĥilkija! Okazis ia konfuzo en la judaj listoj, kaj sendube ankaŭ en la samariana ĉar ili neniam partoprenis la babilonian ekzilon; sed Seraja ja revenis el la ekzilo, kaj diri ke li vivis kvar generaciojn post Ĥilkija ne estas absurde; estas eble ke la Samarianoj konservis tie ne samarianan tradicion sed judan tradicion pri kiun oni konsideru Ĉefpastro de la reveno, laŭ tiu juda grupo. Tamen, pli probable estas ke ili ne povis mencii la nomojn Jeŝua kaj Ezra do ili uzis la nomon de prapatro, la nepo de Ĥilkija (laŭ la juda listo) kiu estis en la serio de agnoskataj pastroj.

La samariana pastra serio konservas tradicion pri la pranepo de Seraja (kiu revenis kun sia popolo post la Ekzilo), kiu estis ekzilata orienten de la Reĝo de la Grekoj laŭ la Tolidah. Sed la Tolidah-Gaster diras ke lin ekzilis la Reĝo de

la Kaldeoj. Abdael, lia filo, revenis el la Ekzilo. La Tolidah-Neubauer diras ke li konstruis templon sur Monto Gerizim kaj ke Sanbalat estis apud li. Do eble ni havas duoblan tradicion pri la ekzilo, kvankam neniu verzio diras ke la popolo akompanis Azarjan en la ekziliĝo. Eblas, se ni akceptas la duoblan tradicion, ke ambaŭ estas listitaj unu post la alia por la kronologia skemo. Azarja eble estas memoro pri la Azarja, la tria pastro antaŭ la babilonia ekzilo, en la skemo de 1 Kroniko 6. En la kvina generacio post la reveno de Abdael (la epoko de Sanbalat, laŭ Tolidah-Neubauer) venis Aleksandro Reĝo de Macedonio kaj venkis la tutan landon, t.e. dum la pastrado de Ĥizkija inter la Samarianoj (laŭ la Tolidah-aŭtografajo). Neĥemja 12:10-11 diras ke Jadia estis kvin generaciojn post Jeŝua, la reveninta Ĉefpastro de la Judoj. Dek ĉefpastrojn generaciojn post Ĥizkija, la samariana Ĉefpastro de la epoko de Aleksandro, Jesuo estis mortigata en la malbenita Ŝalem, dum Jonatan la 3a estis la reganta samariana Ĉefpastro. Dek generacioj de Aleksandro ĝis Jesuo ne estas neprobabla afero. Se ni akceptas la duan tradicion pri la Ekzilo en Tolidah-Bowman-kaj-Gaster kiel aŭtentikan, ni povas supozi ke la pli frua estis fikcia klopodo menci la nordan Ekzilon; kvankam oni agnoskis nur la ekzilon de Boĥtanasar aŭ Nebukadnecar, oni devis almenaŭ aludi al la pli frua ekzilo. Interese estas ke de Abdael la samariana pastro de la reveno (el Ekzilo) ĝis la samariana Ĉefpastro de la epoko de Aleksandro estas kvin generacioj, kaj simile en Neĥemja 12:10-11, estas kvin generacioj inter Jeŝua la juda Ĉefpastro de la reveno ĝis Jadia (de la epoko de Aleksandro). Do la du listoj uzas paralelan kronologion; ĉu ĝi estas adekvata, jen alia afero.

Efektive, la samariana skemo por la periodo estas pli probabla ol la samariana skemo por la periodo inter Aleksandro kaj Jesuo. Sed eĉ Kroniko, speciale la samariana Kroniko, kvankam ambaŭ havas nerealismajn kronologiajn skemojn, estas multe pli bona ol la rabena kronologio de la persa periodo (bazita sur la Seder Olam kiu diras ke estis nur 40

jaroj en la persa periodo). La tradicio en la Miŝna simile uzas la saman skemon kiel Seder Olam, kaj diras ke Simeon la Justulo estis el la Granda Sinagogo de la epoko de Ezra. La rabena tradicio opinias ke la Granda Sinagogo de la epoko de Ezra daŭris dum ne pli ol unu generacio, sed Simeon la Justulo estis plej probable dum la epoko de Aleksandro. Nur kiam judaj kleruloj retrovis Josephus-on, post la Mezepoko, oni ekkonsciis ke la persa periodo nepre daŭris pli ol 200 jarojn. Oni devis akordigi la rabenan tradicion kun Josephus, do oni etendis la nebulcecan Grandan Sinagogon tiel ke ĝin oni listis por la vere tre granda periodo inter Ezra kaj Simeon.

Mi menciis pri Josephus. Estas bone, en la konkludo, kompari lian kronologian skemon pri la antaŭ-ekzila periodo kun la jam donitaj. (Pri la kronologia skemo laŭ Josephus, vidu *Antikvaĵoj* 20, ĉapitro 10.) Josephus diras ke oficis 13 pastroj inter Aaron ĝis kiam Salomono konstruis la Templon, kaj li diras ke pasis 612 jaroj dum tiu epoko; kaj poste 18 Ĉefpastroj de tiam ĝis Josadek, sume 466 jaroj por tiu periodo. Kombinite, tio donas 1078 jarojn. Kontraŭ la 31 pastroj de Josephus dum la periodo, 1 Kroniko 6 mencias 22 generaciojn de Ĉefpastroj. Se ni kalkulas surbaze de 1 Reĝoj 6:1 ke de la Ekzilo ĝis oni konstruis la Templon pasis 480 jaroj, kaj se ni supozas ke pasis 380 jaroj ĝis la ekzilo post 967 a.K., do la suma periodo estis nur 820 jaroj. La samariana serio de Ĉefpastroj nomas 15 ĉefpastrajn generaciojn inter Aaron kaj Jair (la supozita samariana ĉefpastro de la epoko de Salomono). 9 generacioj (laŭ la samariana skemo) inter Jair kaj Akabja la samariana Ĉefpastro ekzilita kun la Izraelidoj dum la unua Ekzilo, tiu de Boĥtanasar (Tolidah-Gaster). Do sume, 24 generacioj inter Aaron kaj Akabja, se ni devas supozi lin samtempa kiel Jehocadak. Do la samariana skemo estas pli simila al tiu de 1 Kroniko 6 ol al tiu de Josephus; ĝi nomas du generaciojn pli ol la listo en Kroniko, sed naŭ malpli ol la listo de Josephus.

Ni devas rimarki ke Josephus, kvankam li diras ke pasis

612 jaroj (anstataŭ 480 jaroj laŭ 1 Reĝoj 6) inter la Eliro kaj la Templo, nur nomas 13 generaciojn inter Aaron kaj Salomono; 1 Kroniko 6 nomas 14 generaciojn por la sama periodo, kaj la samariana skemo 15 generaciojn. Tamen, se Jair kaj Dalja inter Jonatan de la epoko de David kaj Jair de la epoko de Salomono estas forgesataj, la samariana nombro da generacioj egalas al tiu de Josephus (kvankam la nombro da jaroj inter Aaron kaj la Jair de la epoko de Salomono estus eĉ malpli ol la nombro donata de 1 Reĝoj 6:1 inter la Eliro kaj la Templo). Sed la samariana kronologia skemo estas pli simila al tiu de P ol de Josephus. De la epoko de Salomono ĝis la ekzilo de Josadek kaj de la nacio Josephus diras ke pasis 18 generacioj ĉefpastraj. 1 Kroniko 6 trovas nur 8 generaciojn dum la sama periodo, kaj la samariana listo 9 inter Jair (de la epoko de Salomono) ĝis Akabja de la unua Ekzilo. Ni povas supozi 380 jaroj por tiu periodo, inter 967 a.K. (la Templo) kaj la ekzilo en 587 a.K. La samariana listo — laŭ Tolidah-Gaster — donas 334 jarojn por tiu periodo, kaj denove la listo de Kroniko kaj la listo de la Samarianoj pli akordas pri nombro da generacioj kaj da jaroj ol kun Josephus. Se, tamen, Azarja de la samariana listo estas en la plej fidinda samariana tradicio, la nombro da generacioj inter Salomono kaj la babilonia ekzilo laŭ la Samarianoj estas 14 kaj la jaroj laŭ Tolidah-Gaster 548, kio malakordas kun la Biblio kaj kun Josephus, sed estas pli simila al Josephus ol al la Biblio.

Josephus asertas ke sume 83 ĉefpastroj oficis inter Aaron kaj Fanas (70 p.K.) La samariana listo donas nur 46 (samarianajn) Ĉefpastrojn por la sama periodo. Eliŝama estis ilia Ĉefpastro en 70 p.K. Sed ni ne povas kontroli Josephus-on per aliaj judaj atestoj post Jada de Nehemja 12.

TABELO PRI GENERACIOJ KAJ JAROJ

<i>Evento</i>	<i>Samarianoj</i> <i>1</i> <i>(ĝis Akabja)</i>	<i>Samarianoj</i> <i>2</i> <i>(ĝis Seraja)</i>	<i>Biblio</i>	<i>Josephus</i>
Aaron ĝis Salomono	15 gen.	15 gen.	13/14 gen. 480 jaroj	13 gen. 612 jaroj
Salomono ĝis Ekzilo	9 gen. 334 jaroj	14 gen. 548 jaroj	8 gen. (380 jaroj)	18 gen. 466 jaroj
Reveno ĝis Aleksandro		5 gen.	5 gen.	
Aleksandro ĝis Jesuo	10 gen.	10 gen.		
Aaron ĝis Ekzilo	24 gen.	29 gen.	22 gen. 820 jaroj	31 gen. 1078 jaroj
Aaron ĝis 70 p.K.	46 gen.			83 gen.

Konklude: ŝajnas ke la Samarianoj ja klopodis jam frue konservi listojn de Ĉefpastroj same kiel la juda grupo. Kvan- kam ni ne povas trovi materialon el iliaj listoj por studi la nordizraelajn Ĉefpastrojn antaŭ 721, kaj ni devas ne supozi ke tiaj ekzistis, ĉar la Samarianoj estis juda sekto, tamen ni malgraŭ tio trovas ke la Samarianoj uzis 1 Kronikon 6 aŭ 1 Kroniko 6 uzis la samarianan liston. Sed tio estas malproba- bla. La Samarianoj, kiuj neniam akceptis pli ol la Toran,

probable ne uzus Kronikon, verko kiu eĉ laŭ la vidpunkto de la antikvaj Judoj havis duban valoron. Estas eĉ malpli probable ke la aŭtoro de Kroniko uzis parton de la samariana listo, ĉar li celis kontraŭi Samarianismon. Sed estas pli probable ke la simileco de nomoj kaj generacioj, kaj la esenca kronologia skemo, trovebla en la listoj de la Samarianoj kaj de 1 Kroniko 6, venis el komune uzata materialo, kiu esence estas tiu en P. Ni rimarkas ke kiam 1 Kroniko 6 ne estis helpata de Ezra 7:1, tie la samariana listo de ĉefpastroj kaj la listo de 1 Kroniko 6 plej diferencas.

Se ni serĉas historian valoron en la samariana listo aŭ en 1 Kroniko 6, ni ne povas trovi ĝin. Sed kvankam ni ne trovas unuarangan historian valoron, ni povas trovi duarangan, kaj ankaŭ tio utilas por ni. Estus malsaĝe akcepti la liston de 1 Kroniko 6, liston kiu ignoras Jehojadan de la epoko de Atalja (2 Reĝoj 11), Urijan de la epoko de Aĥaz (2 Reĝoj 16), kaj Azarjan de la epoko de Uzija (menciita eĉ en 2 Kroniko 26), inter Amarja de la epoko de Jehoŝafat kaj Ĥilkija de Joŝija; tia listo ne povas esti unuaranga historia informo. Sed informo trovebla pri la koncepto kiun havis Judoj kaj Samarianoj pri sia pasinteco, dum la 3a jarcento a.K., ja estas valora, ĉar iliaj konceptoj iluminas por ni ilian propran epokon kaj informas nin pri ilia koncepto je pastreco kaj la reciproka polemikado. Eĉ kvankam ni ne opinias ke la genealogioj valoras, ili akceptis ilin, evidente; kaj se ni volas kompreni la sadukean Judismon kaj ĝian vere ne tre malsimilan parencon Samarianismo ni devas agnoski ke tia genealogiado laŭ ili estis serioza afero kaj helpis pluekzistigi ilin. La detruo en 70 p.K. de la Templo en Jerusalemo nepre mortigis la privilegiojn de la pastremaj Sadukeoj. Multaj genealogiaj verkoj malaperis tiam. (Kp. Tolidah-Bowman.) Eble ne estus erare, supozi ke la konserviĝo de tiaj pastrolistoj inter la Samarianoj helpis integri la komunumon kaj certigi ĝian pluvivon, ĉar laŭ ili pastro kaj instruisto estas sinonimoj (ni ne trovas paralelon pri la juda rabeneco). Perdi pastran privilegion signifus por ili perdi la vivigan religian forton el la komunumo.

Bibliografia noto

Tolidah = Samariana Kroniko.

Tolidah-Bowman = la Tolidah laŭ manuskripto de John Bowman, kopiita laŭ la Originala Manuskripto en la domo de la Ĉefpastro en Nablus.

Tolidah-Gaster = la Tolidah laŭ manuskripto de Gaster.

Tolidah-Neubauer = la Tolidah laŭ publikigita teksto en *Journal Asiatique* 1869.

LA ALFABETA KAOZO

de Donald Broadribb

En ĉi tiu numero de *Biblia Revuo* du aŭtoroj diskutas problemon kiu konstante pli severiĝas. Doktoro A. Albault, redaktoro de populara gazeto, konsideras la problemon laŭ la speciala tasko reprezenti nomojn en transskribo. Doktoro A. Capell, antropologo, konsideras la problemon laŭ la speciala tasko instrui lingvojn al studentoj.

La problemo estas, simple, ĉi tiu: en artikoloj kaj libroj pri antikvaj lingvoj, oni ofte devas citi vortojn aŭ tekstojn en la originalaj lingvoj. En numero 2 de *Biblia Revuo* en artikoloj de mi kaj de Doktoro Capell aperis granda kvanto da hebrea kaj arabaj vortoj, ankaŭ grekaj tekstoj. Antaŭ jaroj, kiam la prezo de presado estis malmulta kaj presmaŝinoj ne aŭtomatiĝis, oni povis fabrikigi preskaŭ ĉian ajn presliteron, kaj oni kutimis presi la antikvajn lingvojn per la originalaj alfabetoj. Sed en la moderna epoko tio ne plu estas ebla. En la mondo de linotipoj, monotipoj, ke., la araba, hebrea, kaj greka alfabetoj preskaŭ ne ekzistas. Por komposti la hebrean aŭ araban alfabeton mekanike, en intermikso kun ordinaraĵoj, oni bezonus maŝinojn ne ekzistantajn. (Ĉar, inter alie, oni kompostas de dekstre maldekstren por tiuj lingvoj.) Preskaŭ neniu presisto povas aĉeti la specialan mekanikan ekiparon necesan por tia kompostado. Krome, la hebrea kaj araba lingvoj prezentas ekstran problemon pro sia vokalsistemo. Konsekvence, la plej multaj profesiaj gazetoj ne kapablas presigi tekstojn en tiuj lingvoj. Ĉar profesiaj bibli-studoj ne estas vere populara fenomeno, la enspezoj de la gazetoj ne permesas ke presistoj akiru la mult-mil-dolaran ekipaĵon necesan. Pro tio, preskaŭ ĉiu profesia gazeto postulas ke aŭtoroj sendu siajn tekstojn kun transliterumado de la alialfabetaj vortoj. Ekzemple, en *Vetus Testamentum* sur la kovrilo ni legas: "Semitic texts should normally be given in transliteration, unless the use of original characters is

absolutely necessary. . . . Contributions not ready for printing cannot be accepted for consideration." (Semidajn tekstojn oni donu per transliterumado, krom se oni nepre *devas* uzi la originalajn literojn. . . . Artikolojn ne plene prespretajn oni ne povas akcepti.)

Sed transliterumado estas facila vorto kaj malfacila ago. Ankoraŭ neniu sistemo estas ĝenerale akceptita por transliterumado de hebrea, arabaj (kaj eĉ grekaj) tekstoj. La leganto notas ke sur nia kovrilo ni donas tabelon de transliterumado por la hebrea kaj greka alfabetoj. Sed la tabelo valoras nur por la konsonantoj de la hebrea lingvo, kaj neniu indikon donas pri la diversaj supersignoj grekaj. Konsekvence, *Biblia Revuo* havas sistemon por transliterumado de la konsonanta teksto de la hebrea, kaj sensupersigna teksto de la greka. Oni povus, per iom da imagino, apliki la sistemon ankaŭ al la araba lingvo se necese. Nia presejo posedas kelkajn pecojn de la konsonanta alfabeto hebrea, kaj de la greka alfabeto; ne sufiĉe, tamen, por presi tekstojn kaj ne ĉiujn pecojn necesajn por presi tekstojn.

Diversaj gazetoj kaj libroj "solvas" la problemon diversmaniere. La rezulto estas plena kaozo. Ekzemple, en unusola numero de *Vetus Testamentum* ni trovas ke ĉiu aŭtoro uzas propran sistemon, kaj la samaj vortoj estas tute malsimile presataj en la artikoloj. Por ilustrati la problemon, ni konsideru la transliterumadon en la diversaj artikoloj de numero 3, volumo XV (Julio, 1965):

Artikolo de H. A. Brongers: en artikolo pri la hebrea vorto "kaj nun" kiun li transskribas *welattāh*. Tio estas parte fonetika, parte alfabeto transliterumo. Efektive, la *ll* estas prononcata kiel simpla *t*, kaj la lasta *h* estas "silenta." La *e* en la aero signifas la *ŝeĉa*, kiun oni en multaj leksikonoj signas per renversita litero e: ɛ. Sed nun ni rigardu planan frazon en lia transliterumo:

W^{cc}attāh hinnēh 'ānoki hayyom ben hāmēš ušēmōnīm šānāh. (Efektive, li uzas s kun inversita cirkumfleko, anstataŭ ŝ, sed tiun literon ni ne povas presi.) La transliteruma sistemo estas tre malkonsekvenca. Ekzemple, Brongers reprezentas la t kun dageŝ kiel tt, sed la b kun dageŝ kiel b (ĉattāh kaj ĥen). Plurajn longajn vokalojn li ne signis, sed aliajn li signis.

Artikolo de R. E. Clements donas al ni la vortojn yib-ħār, bāħār. Kiel Brongers, li nur parte fonetike reprezentas la vortojn. Li, ekzemple, prezentas la sonon v per la litero b.

L. R. Fisher uzas la kutiman transliterumon por ugaritaj tekstoj, sed ne transliterumas la hebreajn vortojn, kio estas stranga malkonsekvencaĵo.

D. W. Gooding presigis grandan kvanton da greka teksto per la greka alfabeto, kaj kelkajn hebreajn vortojn per la hebrea alfabeto, kaj li uzis la masorajn vokalojn, kio sendube plialtigis la koston de kompostado rimarkinde. Sed, malkonsekvence, kelkajn vortojn li transliterumis, ekz. *lo* (li ne indikis la longecon de la vokalo).

G. H. Jones presigis la hebreajn vortojn per la hebrea alfabeto, kun masoraj vokaloj, kio denove multobligis la kompostkostojn. Evidente la redaktoro ne efektive postulas de la aŭtoroj ke ili obeu la regulon sur la kovrilo.

Andre Lacocque transliterumas la hebreajn vortojn *laŭ la franca alfabeto*. Li do donas al ni *choub chebouth*, kie por ch ni legu ŝ. Rimarku ke la sono v estas skribita kiel b, sed la responda t estas skribita th. Aliajn vortojn ni trovas: yet-siath mitserayim, réchîth, goël, p d h. Sed unuloke li donas la hebreajn literojn דבר sen rimarkebla motivo. Sur alia paĝo li donas tri vortojn per konsonanta hebrea alfabeto (sen vokaloj). Oni rimarkas ke lia transliterumo ne distingas inter la *ŝeûa* kaj ordinara vokalo, kaj eĉ reprezentas la "silentan

La Alfabeto Kazo

ŝe'ā."

A. L. Merrill donas al ni hebreajn vortojn en la hebrea alfabeto, kun masoraj vokaloj, sed en la piednotoj li forgesas doni la vokalojn.

J. R. Porter transliterumas, kaj ni trovas: 'ô, kî, 'im, qādôsh, qedeshā, nephesh, bêth ābhi, sed la hebreajn literojn קֶדֶשׁ en noto sur p. 376, vokalumitan hebrean vorton sur p. 378. En la transliterumado oni rimarkas ke la d sen dageŝ estas d, sed la p, t, kaj b sen dageŝ estas ph, th, kaj bh. Estas malfacile kompreni kial li foje uzas cirkumflekson kaj foje longan strekon super vokalo, kaj li ne indikas ĉiun longan vokalon.

W. Baars donas grekajn vortojn per la greka alfabeto, sed unufoje transliterumas: homoioteleuton.

David Gill donas grekajn vortojn per la greka alfabeto.

H. Mittwoch donas hebreajn vortojn kaj grekajn vortojn per la hebrea kaj greka alfabetoj (sen vokaloj por la hebreaj vortoj). Sed en noto sur p. 388 li donas tri vortojn hebreajn per la hebrea alfabeto kun masoraj vokaloj — dum li forgesas provizi vokalojn al vorto kiun li kontrastas kun ili. Li transliterumas du arabajn vortojn, nabātu kaj nabbātu.

Horst Seebass donas parte vokalumitajn hebreajn vortojn! Li provizis la masorajn vokalojn por kelkaj vortoj, kaj foje por literoj en vorto, sed forgesis aliajn eĉ en la samaj vortoj! Grekajn vortojn li donis per la greka alfabeto.

N.H. Snaith intermiksas vortojn hebreajn en transliterumo kaj la originala alfabeto. Da transliterumoj ni trovas:

yam-sûp, qānāh, tehômôt, mesôlôt, tehôm, JHVH. Tio estas nur parte fonetika sistemo. La e estas reprezento de la *šeûa*; li indikas silentan h. Kelkajn longajn vokalojn li reprezentis per streko kaj kelkajn per cirkumflekso. La simbolo *t* reprezentas la *t* kun kaj sen dageŝ.

H. Cazelles transliterumas hebreajn vortojn tiel: şaddyq, zâr, meşubat (efektive kun inversita cirkumflekso super la s), qnh, kaj li transliterumas unu grekan vorton: ktizein. Evidente la y indikas longan vokalon i, sed la longan a li prezentas per â, kaj la longan u li indikas per simpla u.

John T. Willis donas hebreajn vortojn per la hebrea alfabeto, kun masoraj vokaloj.

Do la kaozo kiu regas en la gazetaro profesia estas tre profunda.

En libroj simila kaozo ekzistas. Por doni nur du ekzemplojn, mi citas unue el libro de John Gray, kaj poste el libro de mi mem. John Gray, en *I & II Kings* (Londono, 1964) regule transliterumis hebreajn vortojn kaj frazojn, kiel ankaŭ grekajn. Ni trovas jenajn malkonsekvencaĵojn: w^elō 'ebyātār ha-kōhēn w^elō yō'āb (notu ke li ne duobligas la konsonanton post la artikolo; li forgesis la *alef* en la vorto lō', dufoje). ^abādāyw (la y estas silenta), ^elōhīm (e en tiu vorto reprezentas alian hebrean literon ol e en w^elō'); b^enē (li ne skribas la silentan y) kaj hokmā (li ne skribas la silentan h), gō'im (li forgesas la literon y, ne silentan), b^ebēytō sed babbayt (li skribas la silentan y en la unua vorto, ne skribitan en b^enē supre; en unu vorto li skribas b sed en la alia vorto bb, por la sama sono) lim^elōk (kie la e estas silenta), kc. Krome ni

La Alfabeto Kaozo

trovas, ekz., gō'im kvankam li aliloke skribis gō'im (kaj plu forgesis la y).

En mia libro *Beginning Biblical Hebrew* mi uzis, konsekvence (krom preteraroj), la sekvantan sistemon: b,g,d,k,p,t kun streko tra la centro de ĉiu, por indiki la "molajn sonojn" (v, f, estas la "molaj sonoj" de b, p; "mola g" kiel la intervokala hispana g; k kiel mola ĥ; mola t kiel en la angla bath). Sen la streko, ili havas la normalan valoron b,g,d,k,p,t. Tiel mi pritraktis la *dageš lene*. *Dageš forte* estas reprezentata per duobligo de konsonanto: nn, mm, yy, kc. : hammáyim, yammím. Longaj vokaloj ricevas strekon; mi indikis akcenton kiam ĝi estas sur alia vokalo ol normale (normale oni akcentas la lastan silabon). La formojn de *še'ua* mi indikis tiel: simpla, per e, kompleksa per a, e, o kun komo sub ili. Ĉar temas pri tajpita teksto, mi povis fari la signon ' (komo en la aero) sed ne la signon ˘ do mi uzis anstataŭe la simbolon @. La rezultinta sistemo estas konsekvence, kaj facile tajpata; sed ĝi ne estas presebla, ĉar pluraj el la simboloj ne ekzistas en presejoj.

Specialan problemon prezentas la bgdkpt-literoj, ĉar historie ili estis ordinaraj konsonantoj, sed en la masora sistemo ili havas specialan karakteron. Se oni uzas historian sistemon de transskribo, oni devas instrui al la studanto ke n estas simpla kaj nn estas duobla; sed p estas vere la sono f, kaj pp ne estas duobla ff sed simpla p.

Mi mem ne proponas solvon por la problemoj; mi nur prezentas la problemon mem. En ĉi tiu numero Doktoro Albault prezentas propran sistemon. La valoro de lia sistemo estas ke ĝi estas (plejparte) presebla sen specialaj literoj; kvankam, estante franco, li supozis ke ĉiu presejo posedas c-cedilan, kio neniel estas vera (nia presejo ĝin ne havas). La malavantaĝo de la sistemo estas ke la aspekto de la rezultantaj vortoj estas tre stranga.

BIBLIA REVUO

Oni povas aparte aĉeti individuajn numerojn de *Biblia Revuo*. Ni rekomendas al abonantoj ke ili kompletigu sian kolekton.

Biblia Revuo 1/1964: Helmer Ringgren, *La T.N. Uppsala-Skolo kaj ĝia Tradicijhistoria Metodo*; Donald Broadribb, *Carl Jung kaj la Biblio*; Ernesto J. Görlich, *Sklaveco en la Antikva Proksima Oriento*; Rodney E. Ring, *La Komisiigo de Petro*. 54p., \$1.25 (U.S.).

Biblia Revuo 2/1965: Stefan Maul, *La Mesio-Prediko de Johano Baptisto*; George Rust, *12 Teorioj pri la Alta Kanto de Salomono*; A. Capell: *Modernaj Metodoj por la Instruado de Semidaj Lingvoj*; D. Broadribb: *La Apostolo (T)addaj*; D. Broadribb: *Poezio Hebrea: Kelkaj Pensoj*. 88p., \$1.25 (U.S.).

Biblia Revuo 3/1965: J. Mánek, *La Novtestamenta Kanono kaj Ekumeno*; D. Broadribb: *Poezio Hebrea: Historia Rigardo*; S. Maul: *Johano Baptisto sur la Sojlo de la Malnova al la Nova Testamento*; A. Murtonen: *Paul E. Kahle kiel Bibli-Esploristo kaj Persono*; G. Rust: *Ŝlosilo por la Apokalipso*. 84p., \$1.25 (U.S.).

Biblia Revuo 4/1965: Donald Broadribb, *La Epistolo al la Romanoj*. 80p. Por abonanto de B.R.: \$1.25 (U.S.); por ne-abonanto, \$2.00 (U.S.).

EKUMENO

ne estas nur moda slogano sed serioza ideo de miloj da veraj kristanoj. La unuiĝo de ili ĉiuj — jen la celo nepre atingenda, se la kristanismo ĉesu esti skandalo!

kristana ekumeno — interkonfesia cirkulero, volas serioze, sincere kaj science kontribui al la klopodoj de la ekumena agado. Verkas por ĝi konataj fakteologoj el ĉiuj eklezioj kaj konfesioj. Ĝi trovas laŭdojn kaj aplaŭdojn de ĉiuj flankoj.

Petu provekzempleron de la redaktoro:

Stefan Maul, Hubertusstr. 2a, 625 LIMBURG/LAHN,
Germanlando.

PROVO DE TRANSSKRIBO DE DU ŜEMIDAJ LINGVOJ (HEBREA KAJ ARABA) KAJ DE LA GREKA LINGVO

de A. Albault

Vorto de la plej multaj lingvoj estas difinebla per du elementoj: skribo kaj prononco. La skribo uzas konvenciajn signojn ĝenerale en limigita kvanto (la alfabetaj literoj) kaj subiĝas al diversaj reguloj (ortografio). Oni konas diversajn alfabetojn: latina, greka, cirila, armena, araba, hebrea, sanskrita, ktp.

La prononco devas esti aŭdata. Diskoj kaj magnetofonaj bendoj povas esti bonaj dokumentoj; ili ne sufiĉas. La orelo, kiu ja nepre devas peri la sencaĵon al la cerbo, estas tre neperfekta organo; la cerbo devas kompletigi. Ja pro tio la sonoj modifiĝas de parolanto al alia, al lingvo al alia. La okulo estas multe pli perceptema organo: tial oni inventis fonetikajn alfabetojn. Ili celas per unu kohera sistemo reprezenti la sonojn de la diversaj lingvoj; ili diferencas de la ordinaraj alfabetoj, kiuj ambicias nur noti la vortojn de difinita lingvo, ja surbaze sed tamen sen troa atento al la prononco. Bone konata estas la alfabeto de la Internacia Fonetika Asocio (alfabeto de Passy). Ĝi ne estas sen malavantaĝoj, kaj ne estas eksklude uzata: ofte estas preferinde uzi skribon pli proksiman al tiu de la lingvo de la leganto. Eblas kompletigi tiun sistemon kaj fari el ĝi scienca instrumenton: la subskribintion faris ¹ kaj uzos kelkajn signojn de sia sistemo en la nuna artikolo.

Sed kion pri *la skribo*? En la redakciaj preskriboj de *Biblia Revuo* ni legas: “citoj en la hebrea aŭ greka alfabetoj devas esti transskribataj per normala literaro”; oni komprenu: per sistemo bazita sur la latina alfabeto. Aperas abundaj ekzemploj jam en la dua numero de *Biblia Revuo*. Simile aperas kelkaj ekzemploj el la araba en la sama revuo. Ankaŭ simile en *Monda Kulturo*, kies redaktoro estas la subskribinto,

Provo de Transskribo

aperas (ĉefe) propraj nomoj el la rusa kaj ankaŭ laste el la sanskrita kaj hindia, dank' al transskribaj sistemoj bazitaj sur nia alfabeto.² La terminologia centro de ISAE, kaj la sekcio por teknikaj vortaroj de la Akademio decidis rekomendi tian cirilan transskriban sistemon. Fine similan sistemon por la armena uzis en la revuo *Esperantologio*³ la aŭtoro, kiu starigis tiajn ankaŭ por la hebrea, la araba kaj la greka. Ĉiuj ĉi sistemoj havas kiel principon ke al ĉiu litero aŭ signo de la originala alfabeto respondu litero aŭ signo de la transskriba alfabeto. Konsekvence la ortografio estas plene respektata kaj eblas aŭtomate pasi de unu skribo al la alia kaj reciproke sen speciala scio (krom, ekzemple, scio pri ligaturoj en la devanagaria skribo).

La intereso de tiaj sistemoj (kiuj respondas ne al difinitaj lingvoj sed al difinitaj skriboj, al difinitaj alfabetoj) estas evidenta: ili estas plena reprodukto de la originala alfabeto *per konataj literoj*. Ili ne atentis la modifojn de la fonetismo, ili ne interpretas, sed fidelas nur al la grafismo. La prononco, se bezonata, devas esti montrata per unu tute alia sistemo kiel ni vidis pli supre. Tiaj sistemoj povas esti uzataj en ĉiuj kulturoj kaj sciencaj revuoj kiuj deziras raporti la ĝustan (originalan) ortografion de propraj nomoj, de apartaj vortoj aŭ de citaĵoj, sed kiuj ne povas, aŭ ne volas, uzi la originalajn skribojn (hebrea, araba, greka, ktp.). Ili povas esti uzataj ankaŭ en didaktikaj verkoj, kie tre certe povas utili kiel eble plej rapide konatiĝi kun la ortografio antaŭ ol plene mastri la apartan skribon.⁴ Ankaŭ lingvistikaj verkoj certe povos, ekzemple, fari pli facilajn komparojn inter diversaj lingvoj post redukto de la diversaj skriboj al skriboj bazitaj sur la samaj elementoj. Ekzemple, la radiko *ktb* estas hebrea kaj araba.

Estas tre certe utile ke la eruditoj estu provizitaj per unueca sistemaro de tiaj transskriboj por la diversaj alfabetoj uzataj en la mondo. Tio verŝajne estas eĉ pli urĝa ol la elekto

de fonetika alfabeto, ĉar unuflanke la Passy-alfabeto estas tre konata internacie, kaj aliflanke ĉiu kulturo havas siajn proprajn (ne internaciajn) transskribsistemojn, krome ne koherajn inter si. Per tiuj linioj mi invitas la eruditulojn al kreado de tia sistemaro kaj mi kontribuas per la tri ĉi-sekvaj provoj.

1. *Provo de transskriba alfabeto por la hebrea*

Por la hebrea, mi kiel eble plej sekvis la proponon en la Psalmoj (119); ankaŭ tiel same por la nomoj de la literoj (asimilitaj nomoj). Tute aparte por la literoj *sameh* (s), *cadî* (c) kaj *šîn* (ŝ). Por la litero *šin* estus plej racie ĝin per modifita s, ekzemple per cedila s; tamen tiu litertipo apartenas al presejoj de malmultaj landoj, tial estas pli bone anstataŭigi ĝin per la cedila c, multe pli facile havebla litertipo (franca kaj latina). 5

Speciala problemo por la hebrea estas la punktitaj literoj. Por la konsonantoj ni povas transskribi per simpla duobligo. Alternativo estus uzi "grasan" tipon, subponton aŭ substrekon. Por la masoraj punktitaj vokaloj ni aplikas la ĝeneralan principon: al unu hebrea signo, unu transskriba signo. Tio kondukas al konsidero de 5 ĉefvokaloj (a,e,i,o,u) kiujn oni povas aŭ longigi aŭ mallongigi. Krome, la *o* same kiel la responda masora signo havas du fonetikajn valorojn (a: kaj o): ni nur transskribas, ni ne interpretas.

(*vidu la tabelon*)

2. *Provo de transskriba alfabeto por la araba*

Sekvas la transskriba alfabeto por la araba kun diversaj klarigoj. Ĝi entenas la arabajn (neasimilitajn) nomojn de la literoj. Duonasimilitaj nomoj povus esti jenaj: hamza, alif, ba, ta, interdenta ta, ĵim (aŭ ĝim), ha, ĥa, dal, interdenta dal, ra, zin, sin, ŝin, sad (aŭ eble cad, laŭ la hebrea?), dad, emfaza ta, za, ain, gain, fa, kof (laŭ la hebrea), kaf, lam, mim, nun, dolĉa ha, ŝaŝ, ja.

(*vidu la tabelon*)

3. *Provo de transskriba alfabeto por la greka*

Preskaŭ ne estas problemoj. Por teto kaj fio oni povas heziti inter la konservo de la klasikaj th kaj ph, kiuj ja respondas al la originaj prononcoj, kaj la elekto de nur unu litero por firme obei la kutiman principon. Ni kompromisis per elekto de th sed de f. Ni konstatas ke ni ne estas la solaj tion fari.⁶ La supersignoj ne prezentas apartan malfacilaĵon. Aliparte, ĉiu presejo kiu kapablas presi la francan povas presi ilin. Oni ankaŭ povas forgesi ilin, almenaŭ provizore. La interpunkcio restas sensanga, krom la signo (;) kiu iĝas ĉu-punkto (?). Plie, se la superlinia punkto (·) ne estas presebla, ĝin anstataŭas la dupunkto (:), kiu konservas la duoblan valoron (: kaj ;).

(*vidu la tabelon*)

Notoj

1. *Universala Fonetika Alfabeto*. Nepublikita manuskripto de A. Albault.
2. *Monda Kulturo*, vintro 1964-5, p.28.
3. *Esperantologio*, II, p.51.
4. *Biblia Revuo* 2/1965, p.32s.
5. *Biblia Revuo* uzis (2/1965, p.75s.) surpunktitan s, sed evidentas el la rezulto ke tio ne estas senpene presebla. Tamen principe ĝi estas bonega alternativo.
6. *Biblia Revuo* 2/1965, p.75s.

TRANSSKRIBA ALFABETO POR LA HEBREA LINGVO

Konsonantoj

Origina	Transskribo	Nomo	Prononco	Rimarkoj
א	'	alef	dolĉa spiro	
ב	b	bet	v	bb ("punktita b") = b aŭ bb
ג	g	gimel	gh	gg ("punktita g") = g aŭ gg
ד	d	dalet	dh	dd ("punktita d") = d aŭ dd
ה	h	he	h ¹	
ו	v, w	vav	ŭ ^{1,2}	
ז	z	zain	z	
ח	ĥ	ĥet	ĥ	
ט	t!	tet	emfaza t	
י	j	jod	j ³	
כ	k	kaf	kh	kk ("punktita k") = k aŭ kk
ל	l	lamed	l	
מ	m	mem	m	
נ	n	nun	n	
ס	s	sameĥ	s	
ע	R aŭ ĉ	rain (ĉain)	akra spiro	
פ	p	pe	f	pp ("punktita p") = p aŭ pp
צ	c	cadi	c aŭ s!	
ק	q	kof	q	
ר	r	reŝ	r	
ש	ŝ	ŝin	ŝ	
שׁ	cedila s aŭ c, aŭ ŝ	sin s		
ת	t	tav	th	tt ("punktita t") = t aŭ tt

1. ne prononcata, se ĝi estas nur vokalindikilo.
2. vo: kaj vu: estas prononcataj o: kaj u: respektive. Sed se oni volas konservi la sonon de la konsonanto, oni uzas maldekstre punktitan vav (ו) transskribitan w aŭ vv: Rowo:n aŭ

Provo de Transskribo

Rovvo:n, prononcata Ra:ŭo:n = maljusteco (עוון).

3. Aŭ signo de longeco por vokaloj i,e.

Vokaloj (masora punkta sistemo)

A. ĉefaj vokalsignoj

Transskribo	Prononco	Ekzemploj	
a	a	bbat = (fil)ino	בת
e	e	'eben = ŝtono	אבן
i	i (foje i:)	min = de	מן
o	a: aŭ o	ĥoq = leĝo	חק
		'ob = patro	אב
u	u (foje u:)	ŝul; ĥon = tablo	שלחן

B. longaj vokalsignoj (: estas signo de longeco)

e: (e:j)	e:	ŝe:m = nomo	שם
ij	i:	bbijn = kompreni	בין
vo:	o:	qvo:l = voĉo	קול
o:	o:	qo:lvo:t = voĉoj	קלות
vu:	u:	mvu:t = morti	מות

C. mallongaj vokalsignoj (; estas signoj de mallongeco)

;	ŝeŭa ⁴	kk;to:b = skribi	כתוב
;a	;a	ĥ;amvo:r = azeno	חמור
;e	;e	';emo:r = diri	אמור
;o	;o	ĥ;olij = malsano	חלי

D. aliaj signoj

, (metego)

4. En la universala fonetika sistemo, la ŝewa (ֿ) prezentas la klare prononcitan sonorano en la francaj je, me, te, le, aŭ la finan germanan e en Lehrer, lernen (le:r;r, lern:n); la punkto (.) estas vokala punkto uzita de Saussure, kaj

Provo de Transskribo

estas konceptebla kiel sonora ; reduktita al preskaŭ nenio, al simpla artikolo inter konsonantoj aŭ fine de vorto: franca la table (la: ta:bl.); angla table (tejb.l).

Provo de Transskribo

TRANSSKRIBA ALFABETO POR LA GREKA LINGVO

literoj	grekaj	niaj	prononco
aŭ signoj	nomoj	nomoj	
α a	álfa	alfo	a (a aŭ a:)
β b	bê : ta	beto	b
γ g	gámma	gammo	g (n antaŭ g, k, h, x)
δ d	délta	delto	d
ε e	èpsilón	epsilono	e
(w) w	dígamma	digammo	ŭ
ζ z	zê : ta	dzeto	dz
η e:	ê : ta	eto	e:
θ th	thê : ta	teto	th
ι i	ió : ta	joto	i (j en diftongoj) aŭ i:
κ k	káppa	kappo	k
λ l	lámdba	lambdo	l
μ m	my	muo	m
ν n	ny	nuo	n
ξ x	xî	ksio	ks
ο o	ò mikrón	omikrono	o
π p	pî	pio	p
(q) q	kóppa	koppo	q
ρ r	rhô	roo	r
ς s	sîgma	sigmo	s
τ t	tây	taŭo	t
υ y	ypsilón	ipsilono	y y aŭ y:
φ f	fî	fio	ph (poste: f)
χ h	hi	hio	h
ψ ps	psî	psio	ps
ω o:	ô: mega	omego	o:
	h	(akra spiro)	h (lokenda antaŭ vokaloj kaj post r)
	ι	(dolêa spiro)	ne prononcata

Provo de Transskribo

TRANSSKRIBA ALFABETO POR LA GREKA LINGVO

literoj	grekaj	niaj	prononco
aŭ signoj	nomoj	nomoj	
α a	álfa	alfo	a (a aŭ a:)
β b	bê : ta	beto	b
γ g	gámma	gammo	g (n antaŭ g, k, h, x)
δ d	délta	delto	d
ε e	èpsilón	epsilono	e
(w) w	dígamma	digammo	ŭ
ζ z	zê : ta	dzeto	dz
η e:	ê : ta	eto	e:
θ th	thê : ta	teto	th
ι i	ió : ta	joto	i (j en diftongoj) aŭ i:
κ k	káppa	kappo	k
λ l	lámdba	lambdo	l
μ m	my	muo	m
ν n	ny	nuo	n
ξ x	xî	ksio	ks
ο o	ò mikrón	omikrono	o
π p	pî	pio	p
(q) q	kóppa	koppo	q
ρ r	rhô	roo	r
ς s	sîgma	sigmo	s
τ t	tây	taŭo	t
υ y	ypsilón	ipsilono	y y aŭ y:
φ f	fî	fio	ph (poste: f)
χ h	hi	hio	h
ψ ps	psî	psio	ps
ω o:	ô: mega	omego	o:
	h	(akra spiro)	h (lokenda antaŭ vokaloj kaj post r)
	ι	(dolêa spiro)	ne prononcata

TRANSSKRIBA ALFABETO POR LA ARABA LINGVO

*(Pro manko de presliteroj ni ne povas presi la arabajn literojn.
Konsekvence ni presas nur la transliterumojn.)*

nomo	trans.	sono
hamza	'	(vidu noton 1.)
alif	:	(vidu noton 2.)
ba:'	b	b
ta:'	t	t
t''a:'	t''	(vidu noton 3.)
ĵym	ĵ	ĵ, ĝ g
h!a:'	h!	(vidu noton 4.)
ĥa:'	ĥ	ĥ
da:l	d	d
d''a:l	d''	(vidu noton 3.)
ra:'	r	(vidu noton 5.)
zyn	z	z
syn	s	s
ŝyn	ŝ	ŝ
s!a:d	s!	(vidu noton 6.)
d!a:d	d!	(vidu noton 6.)
t!a:	t!	(vidu noton 6.)
z!a:	z!	(vidu noton 6.)
Rayn	R	(vidu noton 4.)
Gayn	G	(vidu noton 4.)
fa:'	f	f
qa:f	q	(vidu noton 1.)
ka:f	k	k
la:m	l	l
mym	m	m
nwn	n	n
ha:'	h	(vidu noton 4.)
wa:w	w	(vidu noton 7.)
ya:'	y	(vidu noton 7.)

d!amma	u	u	(vulg. o)
fath!a	a	a	(vulg. e)
kasra	i	i	(vulg. e)
sukwn	.		(vidu noton 8.)
tanwyn	û	un	(finaĵo)
tanwyn	â	an	(finaĵo)
tanwyn	î	in	(finaĵo)
ŝadda	duobligo	ĝemeligo	
madda	:-	'a:	
was!la:	:o	elizio	

1. Hamza kaj qa:f. La hamza (') estas antaŭ vokalo, vokala atako; post vokalo, glota eksplodo. La qa:f estas senvoĉa sono kun glota eksplodo.
 2. La alif (:) ofte sonas a:. Tiam preskaŭ ĉiam ĝi estas akompanata de la fath!a (a). Sed ĝi povas surhavi ĉu la d:amma (u), ĉu la kasra (i) kaj konsekvence prononciĝas.
 3. t''a:' kaj d''a:l respondas al la anglaj th (en bath) kaj dolĉa d (en the).
 4. Spirantoj h! h R G.
 h! laringa senvoĉa spiranto (pura enspiro)
 h laringa voĉa spiranto (angla: h en he, here)
 R laringa voĉa spiranto (= hebrea Rain)
 G velara voĉa spiranto (= pariza kartava r)
 5. ra:' estas langopinta vibro.
 6. s! d! t! z! estas "emfazaj" velaroj.
 7. wa:w kaj ya:'. Solaj ili estas la vokaloj u: kaj i: Kun aliaj vokaloj ili formas diftongojn:
 - a. ascendajn, se ili estas en unua loko (ŭa, ja). Ekz.:
 s!alawa:t = preĝoj, ĥiya:m = tendoj
 - b. descendajn, en la du diftongoj aŭ, aj. Ekzemple:
 ramaj.tu = mi ĵetadis, s!aw.mû = fasto.
 8. sukwn anstataŭas mankantan vokalon kaj finas silabon.
 Ekzemple: bal. = male.
- Ĝemeligo per la ŝadda: tamma = li finas, nawwara = li lumiĝis.

Akcento: sur la unua longa silabo komencante de la fino (silabo estas longa se ĝi finas per konsonanto aŭ per longa vokalo. La tanwyn ne longigas silabon. Se ne estas longa silabo, akcento sur la komenca silabo. Ekzemploj:

ka:fiŝu = malpia (akcentu la ka:)

kuffa:ŝu = malpiaj (akcentu la fa:)

mus.limu = islamano (akcentu la mus)

mus.limuwna = islamanoj (akcentu la mu:)

raĵulu = viro (akcentu la ra)

RECENZO

Beginning Biblical Hebrew, de Donald Broadribb. Dept. of Semitic Studies, Melbourne, 1965. 250 nenumeritaj paĝoj. \$1.50 aŭstr.

La biblia verkisto en la Predikanto diris ke ekzistas nenio nova sub la suno: la moderna scienca vivo kaj speciale ĉi tiu libro elmontras ke la diraĵo ne estas ĉiam vera. D-ro Broadribb estas ekzistiginta ion novan rilate al "gramatikoj" de la hebrea lingvo, t.e. libron kiu uzas vere modernajn metodojn kaj samtempe ĉiujn specojn de nuntempa scio pri la lingvo, la popoloj de la Oriento, kaj multaj aspektoj de biblia klereco. Tiun scion li eldonas al la studentaro kune kun la studo de gramatiko kaj vortaro; la flankrezultoj ja estas multfoje pli interesaj ol la studata gramatiko — kio estas danĝera! La libro estas vere nova traktado por la hebreaĵ studoj.

Kio do estas nova? Tiujn ĉi punktojn oni povas rigardi kiel novajn: 1. Uzo de transskribo anstataŭ la hebrea alfabeto de la komenco mem; 2. aliro pere de simplaj frazoj rilate al la laŭtaga vivo; 3. bibliaj elĉerpajoj aŭ simpligitaj aŭ laŭ la teksto, de frua parto de la instruado; 4. longaj notoj pri eksterlingvistikaj temoj rilataj al la vivmanieroj kaj pensado de la orientaj popoloj. Ni pripensu ĉi tiujn punktojn serie.

1. La studentoj ne komencas lernante la hebreaĵn literojn. La skribsistemo aperas unue en leciono 15, sed eĉ post tiam oni uzas ankoraŭ transskribon en la libro, kie ne montriĝas la hebrea skribo aparte de la alfabeto en tiu leciono.

Tio ĉi reprezentas plibonigon pri metodo jam longtempe malfruan. Pri la tuta problemo de instrumentoj je la semidaj lingvoj oni povas sin turni al *Biblia Revuo* 2/1965, p.32-60 (kaj speciale pri la uzo de transskribo, p.36 kaj 49 sek.), kie la recenzanto plene diskutis la teorion de instruado de lingvoj

kiel la ĉina, japana, ktp. kaj notis ke nuntempe oni utiligas fonetikan transskribon antaŭ la enkonduko de la landa aboco.

La malfacilaĵo tie ĉi temas pri la transskribsistemo. Ekzistas variaj sistemoj por skribi la hebrean lingvon laŭ la ideoj de elparolo kredataj de la instruisto. La fonetikaj metodoj uzataj por skribi la hebreajn literojn ĉiuj faras malfacilon rilate al la presliteroj haveblaj ĉe la presejoj. Oni devas fari indulgon pri tio ĉi kiam oni juĝas transskribmetodojn. Sed estas necese ankaŭ konsideri la skribonton, kaj tie ĉi kelkaj formoj uzitaj en la libro ne estas facilaj eĉ por li. La metodo de utiligo de streketo en letero por indiki frikativan sonon estas bona por skribmaŝino, kaj la verkoj de la Somera Instituto de Lingvistiko utiligas la simbolon, sed restas ankoraŭ necese trovi presiston kiu posedas la presliterojn bezonatajn. Mi deziras klarigi ke mi ne sole ne kritikis la ideon prezenti la lingvon laŭ transskribo, sed mi kore ĝin aprovas; mia sola problemo estas tio ĉi: trovi taŭgan metodon de skribo. La spaco havebla por la recenzo ne permesas diskuti sistemojn de fonetiko, nek la malsamecon inter fonetika transskribo de elparolo kaj litera transskribo de unu alfabeto en alia (pri kio temas tie ĉi); tion mi diskutis en la artikolo jam menciita. Estus eble kompari la metodon uzitan de Rosén kun la metodo de Broadribb, sed la bazoj de la du estas principe malsimilaj, kaj la tuta intenco de la instruado eniras en la aferon. La libro de Broadribb celas instrui la klasikan lingvon; la celo de Rosén koncernis unue la modernan parolatan lingvon. Kun tiu ĉi malsameco de celo estas permeseble ke Broadribb uzu sistemon indikantan la masoran prononcon — se li estas certa ke li scias tiun prononcon! (Efektive, li permesas variantojn.) Tia prononco devas impliki laringajn sonojn ne prezentablajn per romaj literoj, kaj Broadribb elektis signon klaran sed tre malbelan. Kiel la verkisto skribis en privata letero al mi, longtempe antaŭ ol mi sciigis ke la libro aperos kaj ke mi estos recenzanto, eĉ pri mia supre menciita artikolo, “en la komenca jaro, uzu la masoran prononcon. Poste, se la studentoj speciale lernas la modernan

hebrean lingvon, ili lernu modifi laŭ la modernaj kutimoj.”

Restas tamen malkontentiga la traktado de *dageš*. La konsonanto enhavanta *dageš* aperas kiel simpla litero, ekz. *k*. La konsonanto kiu ĝin ne enhavas (kaj tial estas frikativa) portas strekon. Se oni skribas duoblan konsonanton la rezulto estas pli klara, ekz. *hammáym hag^e dōlím* (metu streketon tra la *d*) “la grandaj akvoj” prezentas la duobligon de la inicia konsonanto de la substantivo post la artikolo, sed la simpla *g* de la adjektivo kaŝas la saman fenomenon rilate al *g*, kiu klare aperas se oni skribus *hagg^edōlím*. Ne estas kialo indiki la duobligon kelkfoje per streko kaj kelkfoje per du konsonantoj. Tio ĉi estas malkonsekvenco.

La estanta libro aperas en multobligita formo. Kiam venos la tempo eldoni prese la libron, oni devos trovi pli bonajn simbolojn por kelkaj sonoj. Pri la ĝenerala alir-metodo ne povas esti diskuto: la principo estas sendifekta kaj dum longa tempo dezirinda. Sufiĉu tio pri metodoj de transskribo. La malnovmetoda instruisto probable estos konsternata kiam li vidos ke ne aperas hebreaj literoj en la libro: li memoru ke la studentoj lernos uzi ilin ek de la 15a leciono.

2. La verkisto malakceptas la metodon de aliro per la parolpartoj sekve studataj, kiel en la kutimaj hebreaj gramatikoj. Pri tio ĉi li akordas kun la plej bonaj modernaj instru-metodoj je iu ajn lingvo krom semida. Li uzas la plej kutimajn parolaĵojn, kiujn oni pli ĝenerale bezonas je la laŭtaga vivo. Simile li enkondukas la gramatikon laŭ bezono — komence la plej kutimajn vortesprimojn, poste la malpli kutimajn, sed ĉiam sisteme kaj logike.

3. Por subteni kaj fortigi la frazojn enkondukitajn, la verkisto enmetas tiel frue kiel eble, tuj kiam li povas, bibliajn elĉerpaĵojn, kaj tiuj ĉi kondukas al studo de elĉerpaĵoj el Genezo. Komence ili estas necese simpligitaj, sed poste la plena teksto aperas.

4. Kune kun la gramatika kaj leksika ekspliko marŝas tem-ekspliko, forme de notoj, kelkaj longegaj, pri la historio, skribo, doktrinoj, kutimoj kaj ĉiuspecaj aliaj aferoj kiuj estiĝas dum la ekzercoj. Tio ĉi estas bona, kvankam ĝi plilongigas rimarkeble la libron. Estas eble ke multaj instruistoj deziros doni tiajn eksplikojn mem, ankaŭ ke ili ne akordos kun ĉiuj opinioj de la verkisto, speciale rilate al aferoj implikantaj la nomitan "pli altan kritikon." Tiu ĉi sekcio do povas malamikigi kelkajn uzantojn de la libro. La recenzanto mem trovas multajn el ĉi tiuj notoj interese, kaj estis dankema pri ili; sed ekzistas danĝero ke ili mallarĝigos la vendon de la libro. Ekzemple, kion oni diras pri la koncepto de mito kaj la historio de Edeno: kia ajn povus esti la opinio de la verkisto, multaj lernantoj de la hebrea lingvo ne partoprenus ilin. La libro ne celas instrui pri doktrino kaj kritiko sed pri lingvo. Pli valorus, do, ellasi dubajn notojn ol provoki opozicion ne dezireblan kaj ne necesan, kiu nur malgrandigus la vendon de tre inda libro.

Kiel dirite, la libro estas ĝis nun multobligita kaj bindita en forta papero kun tota dorso. Ĝi enhavas 699 paragrafojn numeritajn, sekvitajn de vortaro hebrea-angla kaj angla-hebrea, kaj finfine gramatika indekso. Tri paĝoj da preseraroj estas enmetitaj. Kiam la tempo venos por presigi la libron — kaj oni esperegas ke ĝi alvenos ne tre malfrue — mi konsilas repensi la sistemon de transskribo, kaj la aferon de eksterlingvistikaj notoj, por ke neniu eventuala uzanto de la libro ofendiĝu, ĉar tiu ĉi libro estas tro valora por riski malakcepton de iu kiu povos ĝin uzi. Tiu ĉi estas la unua peno plene apliki modernajn instrumentojn al la hebrea lingvo, krom la pli ampleksa libro de Rosén. Mi aplaŭdas ĝin, kaj mi esperas ke sen prokrasto la verkisto povos antaŭeniri la verkon al la presigo, kun modifoj tiaj kiaj oni tie ĉi sugestas, kaj eble repenso de la punktoj supre diskutitaj. Dume, mi diras "dankon" al la verkisto pro tre brava, alloga kaj delonge bezonata verko.

A. Capell

MARTIN BUBER, EDUKISTO

de S. Billigheimer

Antaŭ nelonge mi trovis malnovan amikon sur la bretoj de mia librokolekto, preskaŭ forgesitan ĉar la libro publikiĝis en 1907. Ĝia titolo estas *La Socio*, kolekto de soci-politikaj eseoj, redaktita de Martin Buber. Dum Buber redaktis la saman libroserion, la juda filozofo Fritz Mauthner eldonis sian libron pri *Lingvo*. La karaktero de la tuta serio helpas kompreni lian tiaman konatan sintenon pri la socioproblemoj. La tuta serio elspiras la spiriton de la fundamento kiu ebligas sanan renovigon de kadukiĝintaj socikutimoj. Dum tiuj jaroj antaŭ la unua mondmilito, la voko renovigi la socion per reformo de lernejoj aŭdiĝis kaj urĝis — celante socian unuecon.

Sep jarojn post la unua mondmilito, en junio 1925, rimarkinda koincido de du edukaj eventoj okazis en Heidelberg. La kongreso de la *Deutschen Philologenverband* diskutis la problemojn de altlernejoj, vaste, kaj oni debatis zorge la sociajn kaj socipsikologiajn interesojn de la moderna edukado, kaj faris seriozajn decidojn kaj rezultojn por humanismaj studoj. Mi devis recenzi la laborojn de la Kongreso en la ĉefa demokrata ĵurnalo de sudokcidenta Germanlando. Mi finis mian artikolon per la vortoj "Ekzistis tiel intima ligo inter la naciaj celoj de edukado kaj la eŭropa kultura orientiĝo, ke la devo strebi por atingi la eternajn valorojn de la homaro plene realiĝis."

Je proksimume la sama tempo, ankaŭ en Heidelberg, Buber devis ĉefprelegi al la Tria Internacia Eduka Konferenco pri "la evoluo de la krea potenco en la infano." Tiam li diskutis la signifon de la dialoga principo por la fundamento de edukado. Li neniel unuafoje esprimis sian respondecan vidpunkton pri eduko antaŭ sin-dediĉinta kaj progresiva grupo, bone konata pro du antaŭaj konferencoj en 1921 (Calais) kaj 1923 (Montreux). Lia agado pri tiu fako komenciĝis en

1919, kiam oni diskutis en nepublika kunveno en Heppenheim a.B. la renovigon de edukado, kaj interesas legi en la originala prologo al lia prelego pri eduko pri liaj planoj por instrueksperimentoj efektiviĝotaj en Germanlando, Svislando, kaj Nederlando, kaj lia "Plane fuer Palestina."

Lia epokfaranta libro "Mi kaj Ci" (1923), kun sia dialogo principo, prezentas la pensojn de Buber pri edukado.

La infano estas reala; edukado devas iĝi reala. Ekzistas du formoj, nepre necesaj por konstrui veran homan vivon: partopreno en entrepreno kaj reciprokeco. Reala edukado eblas se oni agnoskas ke juna spontaneeco devas kontribui kion ĝi povas. Edukado estas selektado, fare de homoj, el la efektiva mondo, ĝi donas decidan, efikan potencon al selekto el la mondo kiu koncentriĝas kaj manifestiĝas en la edukanto. Per la edukanto la mondo iĝas la vera subjekto de sia efiko. Per li, la selekto el la efektiva mondo atingas la lernanton kiun influas naturo, socio, la elementoj, aero kaj lumo kaj la vivo de plantoj kaj bestoj, kaj edukas rilatado. La vera edukanto reprezentas ambaŭ kaj devas esti por la infano unu el la elementoj. Devigo estas *negativa* realo; *komuneco estas la pozitiva* realo. Libereco en edukado estas la eblico komuni. Vivo vivata per libereco estas persona respondeco. En niaj vivo kaj sperto ni trovas alparolanton; ni povas respondi pense, parole, kaj age. Se la vorto venas al ni kaj la respondo iras el ni, sekve homa vivo ekzistas en la mondo. La homa vivo estas dialogo. Okazigo je la respondo en tiu "flamero" la animo nomiĝas respondeco — pri tiu parto de la vivo destinita kaj donita al ni, pri kiu ni havas agrilaton kiu povas kalkuliĝi kiel ĝusta respondo.

La moderna edukanto kiu eniras la lernĉambron unu-afoje vidas en la multobla diverseco de la infanoj la diversecon de la kreita mondo, antaŭ si. Li ŝajnas reprezentanto de Dio. Se Dio "faras lumon kaj kreas mallumon" (Jesaja 45:7), do la homo povas ami ambaŭ, ami lumon mem, kaj mallumon kiu celas la lumon.

Vera edukado komenciĝas kiam oni spertas la alian. Inkluzivo estas kompleta efektivigo de la dezirato, la "kunulo." Inkluzivo estas do la rilato en edukado. La plej interna efektivigo de la rilato en edukado estas fido. "Kontraŭ la soliga nokto kiu minacas invadi, infanoj kuŝas protektataj, kaj gardataj, nevundeblaj, kovrataj per arĝenta kiraso, la fido." Ĉar tiuj homoj ekzistas, en la mallumo estas kaŝita la lumo, en timo savo, kaj en la krudeco de oniaj kunuloj la granda amo.

La konstanta respondeco pri la vivanta animo direktas la edukanton al sineduko, kiu kunigas la konstruajn fortojn de la mondo, komunigitajn kaj turnitajn al Dio, ilia origino. La homo, la kreito, kiu formas kaj transformas la kreitan kosmon, povas eksposti sin kaj aliajn al la kreanta Spirito. Li povas voki la Kreanton ke li savu kaj perfektigu la bildon de Dio kiu restas sola kiam ĉiuj figuroj de "kulturo" disrompiĝas kaj ne plu kapablas doni formon al la nuna homa materialo.

Tiujn vortojn li parolis dum tre kriza situacio post la unua mondmilito, al plene interdenominacia aŭskultantaro.

En 1939, kiam estiĝis la dua mondmilito, Buber prelegis pri la Edukado de Karaktero al la Nacia Konferenco de Palestinaj Instruistoj en Tel Aviv. Liaj komencvortoj estis: "Eduko kiu indas tiun nomon estas, esence, eduko de karaktero." Li rimarkas la elstaran emon de nia epoko, nei la ekziston de universalaj valoroj kaj normoj kun absoluta validigo; nekalkuleblaj amasoj da homoj ĉie sklaviĝis al kolektivado, kaj ĉiu kolektivo estas la supera aŭtoritato por siaj sklavoj. Kontraŭ la valoroj, dekretoj kaj decidoj de la kolektivo — Moleĥ, neniuj apeloj eblas, ne nur en totalismaj landoj sed ankaŭ en la partioj kaj partiecaj grupoj en la t.n. demokratioj.

La unua tasko de aŭtentika edukanto estas savi la

veran, personan memon el la "ardantaj makzeloj de kolektivismo kiu englutas ĉiun memecon." Oni postulas karakteron el liaj agado kaj sintenoj por respondi al la bezonoj de situacioj, pro profunda preteco respondi per sia plena vivo tiel ke la sumo de agoj kaj sintenoj esprimas la unuecon de ekzisto. Ĉar lia ekzisto estas unueca, lia aktiva vivo koheras en unuecon, aperas unueco el situacioj al kiuj li respondis pro sia respondeco.

"La malbono venas al ni kiel kirla vento," la bono kiel direkto, ordono kiu parolas al ni sed kiu estas neniu alia ol nia propra memo. Li kiu ne plu, per sia tuta ekzisto, decidas kion li faras aŭ ne faras, kaj respondecas pri tio, iĝas anime sterila. Kaj sterila animo baldaŭ ĉesas esti animo.

La sopirado al propra unueco, el tio devas naskiĝi unueco de la homaro, kiun la edukanto devus kapti kaj fortigi en siaj lernantoj. Fido pri tiu unueco kaj la volo efektiviĝi ĝin estas paŝo preter individualismo kaj kolektivismo. Plena rilato inter homoj povas ekzisti nur inter unuigitaj kaj respondecaj personoj. "Aŭtentika karaktereduko estas aŭtentika eduko por komuna vivado." Tia eduko ankaŭ kondukas al la deziro denove vidi la eternajn valorojn kaj aŭdi la lingvon de la eterna normo. Kiu konas internan unuecon, la plejinternan vivon kiu estas mistero, lernas honori la misteron negrave kia estas ĝia formo. Generacio kiu honoras la misteron ne plu estas forlasata de eterno. Kiam venas la teruro de la nova konfuzo kaj *fikcia* mistero kiu obscedas nunajn generaciojn, kiam venas la tempo de erupcio, la eterno kribriĝas el inter la pseŭdoeterno. "Nenio restas krom kio altiĝas super la abismo de la monstraj problemoj aktualaj, kiel super ĉiu abismo de ĉiu epoko: la batado de la flugiloj de la spirito kaj de la krea vorto. Sed kiu povas vidi kaj aŭdi pro unueco ankaŭ vidas kaj revidas tion kio estas videbla kaj revidebla eterne. La edukanto kiu helpas reporti la homon al ties propra unueco helpas remeti lin al pozicio antaŭ Dio.

Tiuj vortoj neniam estis nur teoriaj por Buber. Li pruvigis sin granda savanto kaj helpanto dum la kazo de kondiĉoj en Germanujo post la unua mondmilito; li plenumis sian taskon post ses jaroj antaŭ internacia kaj interdenominacia grupo en Heidelberg kaj en 1939 en Tel Aviv kiam okazis la Nacia Konferenco de Palestinaj Instruistoj en Tel Aviv. Dum kaj post tiam, li klopodis konscii pri tio kio povas altiĝi "super la abismo de la monstraj problemoj aktualaj" per prelegvojaĝoj en Ameriko kaj Germanlando. Kiam lia moralpotenco kontribuis al espero — aliflanke; kaj fine, sed ne malgrave, per lia konstanta laborado en Izraelo por krei situacion kiu forigos la streĉrilaton inter Judoj kaj Araboj.


Ni denove mencias la edukan principon de Buber, laŭ kiu la rilato estas pura dialogo kun duobla tezo: fido en la mondo ĉar ekzistas la homaro, kaj preĝado al la Kreanto savi kaj perfektigi sian bildon en la mondo. Jen la dimensio kaj celo de la baza rilato, la Mi—Ci kiu donis direkton al Martin Buber la edukanto, por doni formon al unueco kun ĉi tiu mondo dum pli ol ses jardekoj da necerto, milito, kaj revolucio; unueco kiu donis al li en diversaj partoj de nia mondo konstantan preton kontribui al la plifortigo de la menso de popolo kiu konsciis pri "la abismo de la monstraj problemoj." Kiam servon li donis per sia frua kolektado je pli ol 14000 ĥasidaj rakontoj kaj ilia multobla formdonado al la okcidenta mondo; kiom serioze kaj profunde Buber kaj Rosenzweig sentis la Bibliion, kiun ili devis traduki ĉar ambaŭ konvinkiĝis ke popolo komencas plenumi sian rolon en la historio de la homaro je tiu momento kiam la bibliotraduko fariĝas ĝia!

En la plej mallumaj horoj de la sendependiĝa milito de Izraelo, Buber eldonis la plej vigligan mesaĝon pri siaj "du specoj de fido", laŭ kiu Izraelo devas renovigi sian fidon per renaskiĝo persona, kaj Kristanismo devas renovigi sian fidon per renaskiĝo nacia; ambaŭ ankoraŭ povas profite konversacii, unu kun la alia.

Sed en la aktuala prezado pri la laboro de Buber kiel edukanto, kelkaj tre kompetentaj voĉoj vidas limojn en la influo de Buber. Isadore Epstein, en sia fundamenta verko *Judismo, Historia Prezento* deklaras tiel: "Vere ĉio ĉi estas nur filozofia formo de valida, juda instruado; sed Buber ignoras la instruon de la Talmudo kaj, efektive, ne opinias ke plenumado de judaj specialaj kutimoj estas esenca por la soci-idealo kiun li proponas. Li ankaŭ ne klopodas prezenti programon kiu indikas kiel realigi tiujn idealojn, kaj tio rezultigis la limigitan influon de Buber je la praktika vivado juda."

Mi konas neniun pli klaran solvon, kiu inkludas kaj la ĥasidan interpreton de Buber kaj la vokon plenumi la judajn kutimojn, i.a. la instruojn de la Talmudo, ol tiu en Roŝ-Hasŝana mesaĝo de Rabeno Menahem M. Schneerson de Lubavitch sept. 1958: "Serĉu la plej internan kaj profundan parton en vi; serĉu ankaŭ la internecon de ĉio apud vi, la animon de la universo; serĉu kaj enlumigu la diecon kiu animigas kaj trafluas la mondón." Krome, "fidu pri la najbara judo kaj donu al li la tutan Toran, nemodifitan kaj nedifektitan. . . kun ĝia vera eterno, ĉar la Tora estas eterna ĉiam kaj ĉie."

Buber kaj Lubavitcher ambaŭ malsimpatias kontraŭ ĉiu formo de la baza malbono de nia epoko: fikcieco; ĉar ambaŭ, siamaniere, sentas honoron pri pura, respondeca rilato inter Dio kaj homo. Laŭ tiu kompreno, la konkludo restas ĝusta: Buber kaj lia laboro, la edukanto proklamas al nia mondo ke la destino de la homo, la homaro, dependas de kiel ĉiu el ni realigas la Mi-Cin ĉi tie, nun.



Notoj pri la Diagramo

1. La radio kondukanta de la centro al la vertico preter

la ekstera periferio, al \aleph indikas la vojon de la individuo, de la "Mi" kiu, kiel vivanta strebanta homo (indikata de sago) renkontas la "Ci"n (indikatan de sago), unue en la familio kaj poste en la socio, kiujn indikas du paralelaj cirkloj.

Ĉiu individua homo prezentas kompleksojn de hereditaj konstituaĵoj el nekalkuleblaj generacioj — kp. la signojn pri Senfino en la centro — kaj eĉ pli la socio — kp. la Senfin-signon inter la du paralelaj cirkloj. Preter ili estas tria cirklo, kiu reprezentas la naturon. La kvara periferio konsistas el la signoj pri Senfino, kaj inkluzivas la homon, la socion, kaj la naturon. La periferion de Senfino enhavas Dio (\aleph), kiel indikas la rektangulaj tangentoj.

La eblojn de la individuo karakterizas la kunfluo de la sferoj de socio kaj naturo ĝis la sperto pri la Senfino kaj Dio.

Religiaj geniuloj iluminitaj de la "Lumo de la Vizaĝo de Dio" prezentigas kiel numeroj (vidu 3., sube) sur la periferio de Senfino kaj sur la vertico de triangulo simbolanta ilian konstruan laboron en la Historio kaj vivo de Judismo kaj la Homaro.

Numeroj 1 kaj 12 montras pli ol unu nomon, kio eblas ankaŭ por ĉiu alia numero. La trianguloj kaj stelaspektaj figuroj (Magen David) simbolas la kontribuon al la laboro "sub specie aeternitatis," t.e. survoje al la mesia regno.

2. Signifo de la hebreaj vortoj malsupre, maldekstre:

a. Ĥanuka 5717 (1957), dato de la originala skizo de la diagramo.

Dekstre, malsupre:

b. Vojoj de la piuloj (inter parentezoj). Sube,

c. Vojo de Vivo.

3. La numeroj sur la ekstera periferio:

A.K.

1. Noa —

Martin Buber, Edukisto

- Abraham, ĉ. 1900
- Moseo, ĉ. 1230
- 2. Josuo, ĉ. 1190
- 3. Samuel, ĉ. 1100-1020
- 4. David, 1013-973
- 5. Salomono, 973-933
- 6. Elija, ĉ. 870
- 7. Jesaja (komenco) 740
- 8. Jeremia (komenco) 626
- 9. Jeĥezkel (komenco) 592
- 10. Ezra (reveno el Babilonio) 458
- 11. Neĥemja (reganto de Judujo) 445
- 12. Ŝerira 968-998 p.K., kaj Hai 998-1038 p.K.
Gaonso de Pumbeditha.
- Israel Baal Ŝem Tob 1700-1760 p.K.
- Patro de la ĥasida movado (kc), ĥabada movado, kc.

EDUKADO EN LA ANTIKVA PROKSIMA ORIENTO

de Brian Colless

Enkonduko

La Biblio abunde prezentas metaforojn kaj aliajn vortkomparojn kiuj helpas nin kompreni la rilaton inter Dio kaj la homo. Multaj tiaj metaforoj troveblas en la antropomorfaĵ titoloj donataj al Jahŭe en la Malnova Testamento, ekz. Patro, Edzo, Reĝo, Paŝtisto, Instruisto, kaj karakterizado de la popolo Izraelo kiel Filo, Filino, Edzino. Rilate al Jahŭe, tiuj atribuoj estas uzataj kune kun la diaj nomoj, kaj rilate al Izraelo kune kun la propraj nomoj, ekz. Jakob aŭ Jeŝurun. Tiuj epitetoj kaj metaforoj venis el la kultura medio kaj historia sperto de Izraelo. Dion oni nomas Roko, kaj Izraelo Vito, sed, kiel rimarkigis G. E. Wright, kvankam la dioj de politeismo estas ĉefe personigo de bildoj el la naturo, ekz. ĉielo, ŝtormo, steloj, la mensa bildo pri Jahŭe estas pri persono kun kiu la homo persone rilatas:

*En la Malnova Testamento, tamen, fundamenta parenceco ekzistas inter Dio kaj la homo, kiu ekzistas inter Dio kaj nenio alia sur la tero. Ne povas esti konfuzo de metaforoj, sekve, kiam oni priskribas lin. La izraela lingvo, parolanta pri Dio, tiras siajn terminojn preskaŭ absolute el la personaj kaj sociaj kategorioj.*¹

Sed necesas diri ke se la vorto "metaforo" estas, laŭ sia difino, aplikado de nomo aŭ epiteto al objekto por kiu ĝi ne estas konkrete valida, tiukaze ni devas uzi la vorton laŭ iom speciala senco; ĉar vortoj kiuj, laŭ nia kompreno, estas metaforoj tamen laŭ la kompreno de la antikvaj Izraelidoj estis konkretaj veroj. Ili, kaj aliaj atributoj, referencas al la specialaj trajtoj de Dio kiujn Izraelo ekkonis dum la interligo kun Jahŭe. Konsekvence ni povas diri:

Biblia religio centras en antropomorfa vortaro, ke Dio la "Mastro" "elektis" Izraelon por si, kaj Dio la "Patro" de

*nia "Mastro" Jesuo Kristo estas. Ĝi centras en la naturciklo.*²

Tie li mencias la doktrinon pri "elekto," kaj ĝi estas bona ekzemplo. Por tiu ideo speciala metaforo estis trovata en la jura fako, interligo.

Dokumentoj konigitaj per arkeologiaj esploroj en la Proksima Oriento dum la ĵuspasintaj jaroj, skribitaj en la sumera, akada, ĥita, egipta, arama, k.a. lingvoj, ebligis ke oni studu profanajn "interligojn" aŭ jurajn principojn de antikvaj epokoj. Esploroj pri tiu fako demonstris ke la formo kaj vortaro de la suzeren-vasalaj interligoj estis uzataj de la Izraelidoj por konkrete esprimi la doktrinon pri la elekto farita de Jahŭe je Izraelo, por fari ĝin lia speciala posedaĵo. Same kiel la antikva suvereno postulis unuflankan interligon de vasala nacio, kaj tiel donis sian zorgon kaj sian proktekton kompanse por obeo kaj tributo, tiel Jahŭe, la Supera Reĝo, metis la popolon Izraelo en similan pozicion de privilegio kaj de devoj.

En tiu esplorfako, oni do utiligas fundamentan principon de bibli-interpretado, nome ke la unua paŝo por kompreni biblian metaforon estas esplori la profanan skemon el kiu kreskis la metaforo.³

Mi celas indiki, ĉi tie, ke la instruisto-lernanto-koncepto estas konstanta temo en la Biblio, kaj do formas gravan metaforon kies profanan historion ni devas konsideri. Sekve, mi nun konsideras la spurojn troveblajn pri la edukaj principoj en la antikva Proksima Oriento.

Unumaniere, tamen, la esprimo "profana historio" ne estas tute adekvata por la temo, ĉar, kvankam edukado de juna babiloniano aŭ egiptano eble estus apartigebla de religia konsidero (kvankam, efektive, la pastra grupo ŝajne estis pli intime ligita al edukado ol iu alia en la antikva mondo),

estus apenaŭ koncepteble ke edukado inter la hebreoj povus ne esti plene di-centra, teocentra, ĉiel religia. Negrave ĉu la instru-situacio estis tiu de pastro, kiu instruis la iniciaton pri sacerdotaĵoj, aŭ de saĝulo donanta sian sagacon al disĉiplo, aŭ de profeto instrukcianta sian grupon de "filoj de la profetoj," aŭ de patro edukanta sian propran filon, edukado en Izraelo estis esence religia instruo. Do tiukaze ni devas, pli ĝuste, paroli pri edukado farata de homoj, kontraste kun tiu farata de Dio. ⁴

Alia afero memorenda estas ke la situo de la eduka procedo estis ĉefe la hejmo, helpata de la sanktejoj; sed en la tuta antikva Oriento liberala edukado en formala lernejo estis rezervata por nur malgranda grupo. Ekzemple, en Mesopotamio, oni trovas ke nur la filoj de urb-registoj, templo-oficistoj, skribistoj, arme-oficiroj, ke., studis en lernejoj. Kiel ofte okazis dum la historio de edukado, la edukadoj estis infanoj kies familioj povis pagi la kostojn.

En Izraelo formalaj lernejoj, kompreneble, iĝis necesa parto de la posta juda religio, donante almenaŭ fundamentan edukon al ĉiu, kaj plejparte ekzistante flanke de tiu alia grava edukilo de Judismo, la sinagogo. Tamen, kvankam oni prave povas konjekti ke ekzistis lernejoj almenaŭ ĉe la reĝa palaco kaj la templo en Jerusalemo dum ekzistis monarkio, tamen publika lernejo, same kiel la sinagogo, ne ekzistis ĝis longe post la unuaj tagoj de la Leĝo de Izraelo.

Malgraŭ tio, ni povas vidi ke, ĝenerale, Jahŭe agas per homaj agentoj dum sia edukado je Izraelo, kaj eĉ se ilia tasko estas doni instrukciojn al homgrupoj en la sanktejoj aŭ la urb-placoj, tamen ili uzas agnoskatajn pedagogiajn celojn kaj principojn. Jahŭe mem estas prezentata de la hebrea literaturo kiel Edukanto— ĉu Patro, ĉu Instruکیanto.

Rimarkinda analogio por la koncepto pri Jahŭe la

Edukado

Instruisto-Patro troveblas facile en la “Historio kaj Sagaco de Aĥiqar,” verko veninta el kaj diskonigata en la internacia saĝec-movado de la antikva Oriento, 5 kaj konservita en multaj lingvoj. 6 Tiun rimarkindan verkon oni trovis, ni menciuj, en frua arama formo, fragmente restinta papirusaĵo, ĉe la sito de juda kolonio sur Elefantino (insulo en la Nilo). Ĝi venas el la epoko de Ezra kaj Nehemja (5a jarcento a.K.), kaj sonas preskaŭ kiel didaktika alegorio de la historio de Izraelo ĝis tiu tempo.

La reĝa asira oficisto Aĥiqar, “la sagaca kaj preta skribisto,” adoptis Nadanon kiel sian filon, 7 kaj celis doni saĝon al li. Nadan montriĝis nefidela, kaj tio fortigas la komparon kun Jahŭe kaj la malfidela Izraelo. Tre memoriga pri la plendoj el la buŝo de Jahŭe estas ĉi tio:

Mi donis al li ok mamnutristinojn; mi nutris mian filon per mielo. . . kaj kiam mia filo kreskis, mi instruis al li librojn kaj sagacon. Nadan ne aŭskultis miajn vortojn, sed kvazaŭ disĵetis ilin en la vento. . . kaj mia filo Nadan komencis mistrakti miajn servistojn, li batis ilin kaj mortigis ilin. . .

La skribisto eĉ havas propran sekretarion, ian Moseon:

Mi donis lin al mia servisto (tlj) Nabuel, kiu devis gardi lin, kaj mi diris al mia servisto, “Skribu ĉion kion mi diros al mia filo Nadan, kiam ajn mi envenos aŭ eliros.” 8

Ekzistas ankaŭ literatura verko el la malnovaj babiloniaj skribist-akademioj, nomita “Skribisto kaj ties perversa filo,” kiu mencias la pasian admonon de patro al ties misaganta filo, pro la nedankemo kaj malobeado. 9

Tio konsciigas al ni pri la demando konsiderinda, kiu pri-traktas la uzadon de kompara materialo el la najbaraj kulturoj de Izraelo.

Ni devas ne nur konsideri informon el la religio de Izraelo

(kaj ni ne forgesu la evoluon de la ideo en la post-bibliaj literaturoj juda kaj kristana, i.a. la qumranaj dokumentoj), sed ni ankaŭ konsideru la aliajn partojn de la antikva Proksima Oriento. Estas konstatende ke ekzistas paralelaj raportoj pri dioj, kiuj diversmaniere okupadis sin per instruado kaj konsilado al la homaro, kaj ilin oni povas konsideri flanke kun la bildo pri Jahŭe la dia pedagogo.

Tamen, demando estas fareda: ĉu temas nur pri paraleloj, kiuj, laŭ difine, neniam kontaktiĝas? Aŭ ĉu ni agnosku ke ekzistis nepre interfekundado de ideoj kiu inkludis Izraelon? Post la tagoj de la Pan-Babilonia fiasko, kelkloke montriĝis klara reago sekvi la kontraŭan direkton, sed ĝenerale oni plu komparas la diversajn kulturojn, kvankam pli singarde.

Lastatempa ekzemplo de la metodo estas studo pri la historio kiu okazigis la gravan lament-psalmon 51. ¹⁰ En tiu verko ni trovas severan admonon de G. R. Driver, kiu esprimas sian konvinkon ke metaforoj kaj teologiaj ideoj povas aperi en diversaj religioj rezulte de sendependa konsiderado. ¹¹ Sigmund Mowinkel simile verkis pri la danĝeroj de "fenomenologiaj paraleloj," kvankam li mem estis arda proponanto de eksplikoj pri la fido de Izraelo per komparo kun najbaraj mitologioj. ¹² H.H.Rowley estas ĉiam fidebla kiel persono kiu donas bonsencan malekstremem vidpunkton, kaj pri la afero li skribis:

Estas malĝusta metodo, trudi la skemon de unu kulturo al alia. . . . Ĉar ni scias ke kvankam Izraelo loĝis en kultura etoso el kiu ĝi sendube prenis multon kiu restis permanente en ĝia religio, ĝiaj profetoj tre forte batalis kontraŭ kelkaj elementoj de tiu kultura etoso. Klare, do, Izraelon oni ne povas kompreni nur per rigardo al tiu etoso, kaj oni devas neniam forgesi la aferojn kiujn ĝi ne havis komune kun la aliaj. Aliflanke, estas danĝere forgesi la heredon kiun ĝi ricevis el la antikva pasinteco kaj la influojn kiuj atakis ĝin. ¹³

Edukado

Sekve ni trovas almenaŭ tri eblajn originojn por la similecoj kiujn ni vidas:

(1) Proto-Semida heredo, aŭ alia influo el la prahistorio de Izraelo.

(2) Probabla influo el eksterlando, veninta rekte, aŭ transdonita (sendube de la Kanaanidoj ¹⁴).

(3) Sendependa kreaĵo Izraela.

Ĉiam estos danĝere malfacile decidi pri kiun el tiuj alternativoj elekti por ĉiu specifa afero, sed eĉ kiam transpreno estas pruvebla, ĉu lingva, ĉu mitologia, ĉu kia ajn, nepre demandende estas: kian signifon ĝi havas en sia nova kunteksto?

Ni povas vidi ke la tuta religio de Izraelo, i.a. la speciala aspekto kiun ni konsideras nun, montras klaran similon al la mitologioj de la antikva Oriento, sed kun tre gravaj diferencoj kaj emfazo-ŝanĝoj.

Edukado en la antikva Egipto

Ni scias ke ekzistis formalaj lernejoj frue en la dua jar-milo a.K., en Egipto. Specifaj mencioj pri lernejoj troveblas en didakta verko originale veninta el la Meza Regno (2150-1750 a.K.), aŭ pli frue. ¹⁵ Oni nun kutime nomas ĝin la "Instruo de Ĥetj," kvankam pli frue, malkorekte, oni nomis ĝin la "Instrukiado de Duauf." Ĝi havas tiun prologon:

Komenco de la instrukcioj kiujn viro el la ŝip-kabano (eble: el Tjaret), kies nomo estis Ĥetj filo de Duauf, faris por sia filo nomita Pepj, dum li veturis al la Reĝa Urbo por registri lin en la Skrib-Lernejo (eble: Libro-Lernejo) inter la filoj de oficistoj. . . . ¹⁶

El la Nova Regno kaj postaj epokoj venis amaso da

materialo rilatanta al la edukado de skribistoj, sed ni malmulte informiĝas pri la organizado de edukado en la Malnova kaj Meza Regno. 17

Skribista edukado, evidente, estis tiel antikva kiel hieroglifa skribado mem, kaj oni scias ke la Unua Dinastio de Egipto, ĉ. 3000 a.K., disponis pri tiu malfacila sed tre utila skribarto.

Socian kaj sekretarian edukadon oni faris malpli sisteme, per instruantoj en, ekz., la palaca virindomo. 18 Rimarkindan nombron da famaj sagaculoj kaj instruistoj de la Malnova Regno ni konas kiel princojn, vizierojn, kaj ĉefajn oficistojn kaj pastrojn. 19 Bone kvalifikitaj pro siaj aĝo, sperto, kaj pacienco, ili grupigis ĉirkaŭ si "filojn" aŭ lernantojn. 20

Edukado estis la rajto de elito, tamen, kaj lernantoj kutime estis nur nobelaj. Sed ni ankaŭ trovas ke edukado fariĝis iom post iom rimedo per kiu malaltaklasa persono povis socie levi sin. Eble Ĥetj kaj lia filo Pepj estis el malalta klaso, ĉar ni trovas neniun indikon pri ilia socia pozicio. 21

La bezono havi teknike kaj etike edukitan burokrataron, kiu estis tre akra post la anarkio sekvinta la disfalon de la Malnova Regno, stimulis la organizado de edukado laŭ formala sistemo.

La instrua kurso konsistis ĉefe el legado kaj skribado, kvankam oni ne neglektis matematikon. 22 Supozeble la lernanto morale edukiĝis per sia kopiado de la antikvaj libroj de saĝeco, kio estis kutima en la lernejoj. Pro tio, kiel ofte kiam temas pri la antikva Oriento, ni havas multan literaturon nur pro la skribtaskoj de lernantaj infanoj.

La Instruado de Ĥetj estas ekzemplo. Alia simila didakta traktato konsistas el sentencoj, el kiuj granda parto rimarkinde similas al partoj de la biblia libro Sentencoj (22:17-24:22): 23

la Instruado de Amen-Em-Opet.²⁴ Simila fonto de preceptoj kaj sentencoj estas la Instruoj por Reĝo Meri-Ka-Re:²⁵

Juste agu dum vi vivos sur la tero. Trankviligu la plorantojn, ne perfortu vidvinojn. . . Ne mortigu: vi ne povas profiti per tio. . . Eterna estas la posta ekzisto. Kiu mokas pri ĝi estas stultulo.

Disciplino povas nur mallonge atentigi nin. "La oreloj de infano estas sur ties dorso; ĝi aŭdas kiam oni ĝin batas." Tiu cito sufiĉas por indiki kiel oni lernigis la lecionojn. Bruner listis la ĉefajn disciplinajn manierojn: batado, ĉenado, malliberigo, minacoj, admono kaj flato, rivaleco kaj konkuro, allogado per mencio pri rozkolora futuro, laŭdado, imitado.²⁶

Kiu studis en egipta lernejo emis aroganti rilate al metiistoj kaj farmistoj, sed laŭdi la profesion de skribistoj.²⁷ Escepto rilate al tio estas tamen la Instruo de Onĉeŝonqj, kiu indikas ke oni instruis en la kamparo, kvankam la prologo montras urban, palacan siton. La metioj postulataj de la filo estas farmaj, kvankam skribado estas unua en la listo: "Via filo lernu skribi, plugi, birdkapti (aŭ: "fiŝkapti)".²⁸ Tiujn malpli klerajn metiojn, agronomio kaj manlaborado, la patro transdonis al la filo, aŭ oni lernis aprentice. Efektive, tio estis la idealo por ĉiu profesio, ankaŭ la skribista: la plej bona lernejo estas la patro, aŭ influhava parenco.

Ni povas noti interesan ŝanĝon kiu okazis rilate al la edukaj idealoj dum la epokoj. Antaŭ la imperia epoko (ĉ. 1500), oni emfazis "instrui senseciulojn pri saĝeco kaj maniero bone paroli."²⁹ Poste, la arto konservi disciplinitan, diskretan, rezignan silenton fariĝis la *summum bonum*. La "parol-metiisto" cedis al la "vere silenta homo."³⁰

Kleruloj kaj skribistoj konis la dion Thoth kiel sian patronon. Thoth el Hermopolis estis la dio de saĝo kaj la

skribisto de la dioj. Li estas la ibis-kapa figuro, kiu registris la tribunaldecidojn kiam oni "Juĝis la Animon," kiel oni vidas per la bildoj en la fama Libro de la Mortintoj.

Edukado en la Antikva Mesopotamio

En Mesopotamio, ni povas certi, kiel pri ĉiu antikva socio pri kiu ni traktas, ke fundamenta estis instruado donata de la gepatroj. Dum ĝiaj unuaj jaroj la infanon instruis la patrino, kvankam oni scias ke oni dungis profesiajn vartistinojn. (*Taritu* 31.)

La patro estis la edukanto de la familio, almenaŭ de la filoj. 32 Lia devo inkludis, ŝajne, la mesopotamian varianton de relia edukado: nome lerni la kvindek ĉefajn nomojn de Marduk kaj, supozeble, ankaŭ liaj miraklojn. La babilonia Kre-Eposo, *Enuma Eliŝ*, finas per admono kiu eble indikas la metodojn de publika instruado:

*Per la titolo "kvindek" la grandaj dioj
Nomis lin, kies nomoj estas 50, kaj plejsuperigis lin,
Oni memoru ilin, la gvidanto ekspliku ilin.
La sagaca kaj scianta kune diskutu ilin.
La patro deklamu kaj konigu ilin al sia filo.
La oreloj de la paŝtisto kaj brutisto aŭskultu. 33*

Krome, unu el la leĝoj en la Kompilo de Hammurabi ŝajne montras ke patroj instruis la familian metion al siaj filoj:

Se metiisto adoptis infanon, kaj al li instruis sian metion, oni neniam povas repostuli la infanon. 34

Iukaze, ni memoras, pri tio, ke membron de metia sindikato, aprenticon de metiisto, oni nomis "filo de metiisto" (*mar ummani*). 35 Do, en la leĝo ĵus citita, "metiisto" estas, efektive, nomita "filo de metiisto." La patra rilato ankaŭ estis uzata en la tuta antikva Proksima Oriento por esprimi la rilaton inter instruisto kaj lernanto, ĉar la instruisto estis *in loco*

Edukado

parentis. Tia koncepto estas evidenta en letero akada trovita ĉe Ŝeĥem en Palestino. Instruisto deklaras:

La infanoj kun mi plu lernas. Mi estas iliaj patro kaj patrino ĉiutage. 36

Ni notu ke la saman ombrelan terminon, *ummanu*, oni uzis por la instruisto en la mesopotamia lernejo. 37

Ni nun konsideru kiel oni instruis agronomion. Ni trovas ian "Almanakon por Farmistoj," nomitan *Uul Engarra* (laŭ la komencaj vortoj de la verko):

*Antikve, farmisto instruis al sia filo:
Kiam vi pretas kultivi vian kampon, zorgu malfermi la irigaciilon tiel ke la akvo ne tro inundas.*

S. N. Kramer notas ke la enhavo de ĉi tiu kuneoforma dokumento de pli ol 100 linioj reprezentas instruojn de farmisto al sia filo pri la ĉiujara agronomia agado, de la inundo de la kampoj en majo-junio ĝis la purigado kaj draŝado en aprilo-majo. 38

Pri formala edukado, multa informo klardetala montriĝis pri la mesopotamiaj lernejoj, kie oni edukis infanojn "de infaneco ĝis vireco" 39 pri la skrib-arto, la "Patrino de oratoroj kaj patro de kleruloj" laŭ sumera sentenco. 40 La sumera vorto, *edubba*, kaj la akada nomo, *bit tuppate* aŭ *bit tuppi*, por tiu akademio, ambaŭ signifas "Skribil-domo."

Sekve, pro miloj da argilaĵoj verkitaj de lernejinfanoj kaj pro kelkaj literaturaj verkoj, probable verkitaj de instruistoj, ni havas iom da scio pri la kursoj kaj ĉiutaga fukciaĵo de tiu antikva sistemo. 41

Kvankam sendube la ĉefa produkto de la lernejo estis amaso da skribistoj kiuj rolis grave en la intelekta, komerca,

kaj armea fakoj, la rilato inter la lernejo kaj la pastraro ne estas tute klara. La pastron oni ne nomas inter la Edubba-personoj, en la materialo, ⁴² sed daŭra konekto inter la skribistoj kaj la pastroj estas, laŭ G. R. Driver, indikata de la uzado de sama ideogramo por pastro kaj por skribisto eĉ en neo-babiloniaj tekstoj. ⁴³ A. Falkenstein indikis la rilaton inter Edubba kaj la kultura centro en ĉiu epoko, komence kun la templo sed poste rilate al la reĝa palaco en la tria dinastio de la epoko de Ur, kaj post tio rilate al la templo denove. ⁴⁴ Krome, ĉar la sumera civito estis, ideale, konstruita sur fundamento ke la urb-dio posedas la tutan farmteronon, ⁴⁵ la templo bezonis la laboron de skribistoj por fari detalajn registrojn, ⁴⁶ kaj ankaŭ pastrojn kiuj prizorgis la deklamadon de mitoj kaj la plenumadon de ritoj. Tamen, restas respondende ĉu ĉiuj skribistoj edukitaj de la lernejoj estis, per tio, pastroj. Por decidi pri tio, ni eble devas ignori la tre profanan karakteron de la Edubbaj verkoj, kiuj parolas pri infanaj misagoj, disputoj, kaj malobeado; ni konsideru ilin kiel ateston pri nia propra sentenco ke "infanoj agas infane," eĉ en modernaj ekleziaj lernejoj.

Iukaze, misagojn oni efike punis, kaj ni lernas klare pri la disciplinaj rimedoj. Batado estis ne nur la rajto de la "vipisto," sed ankaŭ de la aliaj instruistoj kaj kontrolantoj:

Se la juna "filo de la lerndomo" (la kutima nomo de lernanto) ne deklamis siajn taskojn, la "granda frato" (probable studenta instruanto) kaj lia "patro de la lerndomo" (sendube la ĉefinstruisto) batu lin. ⁴⁷

Ĉenado ankaŭ troveblas:

Bronzan ĉenon al lia piedo mi ligos. En la domo li povos promeni, sed el la lerndomo dum du monatoj li ne iros. ⁴⁸

Ni povas demandi: kia estis la *Bildungsideal* de la Edubba, kaj ni trovas klaran respondon. La Edubba, laŭdire, "malfermis la okulojn" kaj "malfermis la orelojn," kaj faris

Edukado

aŭtentikan homon. Tiel honoras sian instruiston lerninto:

Kiel hundidon, vi malfermis miajn okulojn, vi faris min homo. 49

Van Dijk konstatis ke la koncepto "humanismo" (*nam-lu-lu*) estas preciza ekvivalento de la latina termino *humanitas*, kaj ties moderneŭropaj derivaĵoj: (1) "la homaro," (2) "la plena florado de homaj valoroj, humanismo." 50 Sekve, la idealo estis klasika eduko, kun studo pri la klasika lingvo, la sumera, por homigi la sovaĝan karakteron de ĉiu homo. Lerteco pri la sumera lingvo, kiel konstatis C. J. Gadd, estis, evidente, "kaj la celo kaj la kriterio de instruado." 51 Unu produkto de la lernejo, "granda frato," deklaris fiere:

Kengi-re-me-en. ("Mi estas sumeriano.") 52

Ankaŭ en Mesopotamio la akademioj havis patronadiojn. Unue, la diinon Nisaba (Nidaba); poste, Nabu (en la Biblio: Nebo) estis la dio sub kies egido la kleraj scioj estis praktikataj kaj transdonataj. Nabu mem rolis en la ĉielaj kunsidoj, estante registranto de la decidoj kaj dekretoj de la dioj.

Edukado en la Antikva Izraelo.

Se Egipto kaj Mesopotamio havis lernejojn kun patronadioj, kiuj gardis la lernadon skribistan kaj sacerdotan, ni do povus anticipi trovi similan aferon en Izraelo, ĉe la templo aŭ palaco. Efektive, tamen, kvankam la ugaritaj tekstoj kaj trovaj atestas pri biblioteka lernejo, 53 la vorto "lernejo" eĉ ne troviĝas en la Malnova Testamento, kvankam ni trovas la vorton unufoje en Ben Sirah (51:23: hebrea, בית המדרש, greke, οίκος παιδείας, kaj unufoje en la Nova Testamento. (Agoj 19:9). Tio temas pri greka lernejo en Efeso. La situacio estas tute inversa en la Talmudo, 54 kompreneble, kie oni ofte deklaras ke lernejoj estas nepre necesaj por judaj komunumoj. Sekve, laŭ la eksteraj atestoj, iuj konkludis ke ekzistis lernejo por skribistoj en Jerusalemo, intime ligita al la

templo, fondita de Salomono. 55

Certe ni povas supozi ke la reĝa idaro kaj la infanoj de nobeloj kaj de ŝtat-oficistoj speciale edukiĝis. En la palaco de la Reĝo Aĥab de norda Izraelo ni trovas "gardistojn" (ʾōmnīm), terminon tradukitan por la Septuaginto kaj la Vulgato kiel "vartistoj por la reĝaj infanoj" (2 Reĝoj 10:1,5). Sendube, ankaŭ Salomono havis reĝajn instruantojn por la multaj infanoj de liaj fremdaj kaj palestinaj edzinoj. La Readmona teksto postulis de la reĝo ke li havu propran ekzempleron de la Leĝo, sed ne estas tute klare ĉu la fakto ke kaj Joŝia kaj Jeĥojakim aŭskultis dum oni legis al ili indikas ke ili estis aalfabetoj.

Krom pri la reĝaj infanoj, do, gepatroj devis prizorgi siajn infanojn kaj ties edukon. Tio estas klara ek de la tempo de Abraham, kiu devis "ordoni al siaj filoj kaj al sia domo post si ke ili observu la vojon de Jahŭe" (Genezo 18:19). La valoron de tio emfazas speciale Readmono (Readmono 4:9, 6:4-9). Same kiel la babilonia *paterfamilias* devis deklami la nomojn kaj agojn de la dio Marduk, tiel la izraela zorge kaj daŭre deklamis al sia filo la savajn miraklojn kiujn faris Jahŭe por sia popolo dum pasintaj jaroj, kiel ankaŭ solenajn instruaciojn pri la devoj kiujn havas la savita nacio.

La tri jarfestoj judaj, pasko, pentekosto, kaj tendoj, estis idealaj por tia instruado. Efektive, rilate al pasko, tia instruado estis postulata, ĉar ĝi estis integra parto de la necesa rito: "Diru al via filo dum tiu tago, 'Estas pro tio kion faris Jahŭe por mi kiam mi venis el Egipto.'" Ni scias per la miŝna traktato Pesahim, kaj speciale la paska hagada, ⁵⁶ ke tiun ordonon oni dum postaj jarcentoj ampleksigis por fari serion da demandoj kaj respondoj kiujn faras la plej juna filo. Li komencas per: "kial ĉi tiu nokto diferencas de iu alia nokto?" Sekve, ĉar la festoj ne nur estis agronomiaj (Levidoj 23) sed ankaŭ religiihistoriaj (Readmono 16:12, Levidoj 23:43), ili estis bonaj iloj por instruado, kaj gepatra kaj publika.

Edukado

William Barclay diras koncize:

Estas facile vidate ke la judaj festoj kaj festenoj mem estis neegaleblaj oportunoj por instrui la historion kaj la donacemon de Dio. Antaŭ ol eĉ ekzistis lernejo, filo lernis de sia patro la historion de la nacio, la sanktecon de Dio, kaj la donacemon de Dio en la natura mondo. 57

Simile, Sentencoj, la plej antikva libro izraela de edukado, konstante memorigas ke la praktikaj sagaco kaj spiriteco ofte nomata "saĝeco" havas fundamenton en la instruado de gepatroj. La komenca ĉapitro donas al ni nocion pri la enhavo de la instruado kiel ankaŭ kompreno pri kiu devas doni ĝin:

*La timo antaŭ Jahŭe estas la komenco de sciado,
Saĝon kaj instruon malpiuloj malestimas.
Aŭskultu, mia filo, la instruon de via patro,
Kaj ne forĵetu la ordonon de via patrino. (Sentencoj 1:7-8)*

Ankaŭ tie ni vidas ke la patrino, kompreneble, grave rolis pri la edukado de la filoj kaj ne nur de la filinoj.

Ĉiu el la gepatroj devis "eduki" (הנריך) infanon "konforme al la vojo, kaj eĉ maljuniĝinte li ne dekliniĝos de ĝi." (Sentencoj 22:6). La devoj de la gepatroj estas duoblaj: instrui kaj korekti. Ambaŭ aspektojn esprimas la sama hebrea termino: מוסר.

Izraela edukado estis ĉiam religia kaj etika, kaj ĝiaj celoj estis fari la "Izraelidojn" sanktaj kaj perfektaj, kiel ankaŭ praktikigi religion. Jen la celo farita de la saĝuloj (חכמים) de la antikva Izraelo kaj iliaj heredantoj kiuj uzis la saman titolon, nome la rabenoj. La prologo de Sentencoj esprimas tiujn celojn jam en la komenco, kulminante kun la devizo de izraela pedagogio: "La timo antaŭ Jahŭe estas la komenco de sciado."

*Por scii saĝon kaj moralinstruon;
Por kompreni parolojn de prudento;*

*Por ricevi instruon pri saĝo,
Vero, justo, kaj honesto;
Por doni al la malkleruloj spriton,
Al la junulo scion kaj singardemon. (Sentencoj 1:2-5).*

La saman idealon esprimis aliloke la Biblio, kaj la Reĝo (Readmono 17:19) kaj la ordinarulo (Readmono 31:9-13) devis legi, aŭ aŭskulti, la tutan Toran por lerni “scii timi Jahŭen”

Komprenoble la produkto de edukado povus esti senvalorulo, kaj oni tute ne ignoris tiun eblon (כספי, nur unu el la vortoj por “malsaĝulo” troveblas 49-foje en Sentencoj):

*Filo malsaĝa estas ĉagreno por sia patro,
Kaj malĝojo por sia patrino. (Sentencoj 17:25)
Tiam, sendube, oni neglektis la disciplinan taskon:
Kano kaj instruo donas saĝon;
Sed knabo, lasita al si mem, hontigas sian patrinon. (29:15)
Malsaĝeco forte sidas en la koro de knabo,
Sed vergo punanta ĝin elpelas el ĝi. (22:15)
Kiu ŝparas sian vergon, tiu malamas sian filon;
Sed kiu lin amas, tiu baldaŭ lin punas. (13:24)*

Sekve, la ĝusta rezulto de mŭsār, instruado kaj disciplinado, devas konformi kun la skemo trovebla en la sekvanta tabelo de preceptoj:

*Elmetu vian koron al instruo
Kaj viajn orelojn al paroloj de prudento.
Ne malvolu puni knabon:
Se vi batos lin per kano, li ne mortos.
Vi batos lin per kano,
Kaj lian animon vi savos de Ŝeol.
Mia filo, se via koro estos saĝa,
Tiam ĝojos ankaŭ mia koro.
Kaj mia internaĵo ĝojos,
Kiam viaj lipoj parolos ĝustajon.*

Edukado

*Via koro sin tiru ne al pekuloj,
Sed al timo antaŭ Jahŭe ĉiutage.
Ĉar ekzistas estonteco,
Kaj via espero ne perdiĝos. (23:12-18)*

Praktike, eduko estus pri agronomio kaj metioj. Oni ofte indikas ke farmistojn kaj metiistojn kontrastas kontraŭ skribistoj la Saĝeco de Ben Sirah (38:24-34), en teksto kiu ŝajnas malfrua imito de la egipta satiro pri metioj:

*Kiel povas esti saĝa la pluganto. . . ?
Li pensas nur pri plugado de sulkoj,
Kaj li atentas manĝaĵojn por la bovinoj.
Same ĉiu metiisto kaj laboristo
Kiu laboras nokte kaj tage.*

Sed ni notu ke la Saĝulo ne malrespektas la manlaboriston, li nur diras ke la Saĝulo devas formeti praktikajn taskojn por povi lerni kaj doni saĝecon. Male, metiistoj tre bone plenumas la sentencon *laborare est orare*:

*Ili ne sidas sur seĝo de juĝisto. . . .
Ili ne povas instrui disciplinon aŭ juĝojn. . .
Sed ili subtenas la konsiston de la mondo,
Kaj ilia preĝo estas ilia laboro. (33-4)*

Ni nun konsideru instruon rilate al tiuj du aspektoj de la izraela kulturo, kiel pri la aliaj civilizacioj.

Instruo pri tempo kaj sezonoj, pri nasko kaj kresko, estis por izraelido studo pri la daŭra agado de Dio en la kosmo, ĉar Dio deklaris ke “De nun tiel longe kiel la tero ekzistos, semado kaj rikoltado, malvarmo kaj varmo, somero kaj vintro, tago kaj nokto ne ĉesiĝos.” (Gen.8:22) Krome, la scio de farmisto estas dono de Dio, kaj la farmiston instruas Dio mem (Jesaja 28:23-9).

Ilustro pri tio estas la Kalendaro de Gezer, ŝtona skribsurfaco el ĉ. la 10a jarcento a.K., sur kiu estas teksto en la hebrea lingvo pri la agronomia jaro. Ĝi estas ia prototipo antikva de almanako por farmistoj. Post konsidero pri ĉiuj sugestoj faritaj dum 40 jaroj da laboro, S. Moscati akceptis

la vidpunkton de W. F. Albright ke ĝi eble estis "ia memoriga limeriko por infanoj," skribita de infano sur ekzerco-tabuleto. 58

Aliajn sugestojn oni faris pri la originala celo, kaj oni malakordas pri detaloj de traduko. Traduko lastatempe farita de J. Mauchline donas:

Du monatoj da rikoltado. Du monatoj da semado.

Du monatoj da malfrua semado (aŭ: printempa kresko).

Monato da ellirado de lino.

Monato da rikoltado de aveno.

Monato kiam ĉio rikoltiĝas.

Du monatoj da tondado.

Monato da somerfruktoj. 59

La Talmudo poste inkludis en listo, kiu detalis la devojn de patro pri filo, du ĉefajn edukaferojn: instruado je la Tora, kaj metio. Pri tio, Rabeno Judah ben Ilai laŭdire aldonis ke kiu ne instruas al sia filo metion instruas al li ŝteli. Certe tio estis fundamenta en la antikva Izraelo ankaŭ. Jesuo el Nazaret, filo de ĉarpentisto, estas la plej bona ekzemplo en longa listo de Izraelidoj kiuj edukiĝis de la patrino kaj patro.

Fine, ni trovas neniun indikon en la Nova Testamento pri vario en la antikva sistemo. Paŭlo lernis de Gamaliel, la apostoloj instruis en la templo kaj sinagogoj, kaj ekzistis kristanaj katekismaj lernejoj. Ĉiu eduko menciita en la Nova Testamento estas, tamen, farata de gepatroj. Timoteon frue instruis la patrino kaj prapatrino, kaj Paŭlo memorigis al li ke la Biblio donas, laŭ nia terminaro, komprenon pri la enhavo kaj celo de kristana eduko. Kiel dum la Malnova Testamento, instruoj kaj disciplino celas akiri saĝecon kaj savi fidon:

Jam de frua infaneco vi konas la sanktajn skribojn, kiuj povas fari vin ŝaga por savo per la fido kiu estas en Kristo Jesuo. Ĉiu skribaĵo inspirita de Dio estas ankaŭ utila por instruoj, por admonoj, por korektoj, por disciplino en justeco; por ke la homo de Dio estu perfekta, plene provizita por ĉiu bona laboro. (2 Timeoteo 3:15-17)

Edukado

Tie la apostolo ne nur prezentas koncizan resumon de la celoj de kristana eduko, sed ankaŭ de la instruo de la malnova izraela edukolibro, Sentencoj.

Ni nun rigardis la organizon kaj enhavon de edukado en tri ĉefpartoj de la antikva Proksima Oriento: Egipto, Mesopotamio, kaj Izraelo mem.

Ni trovis ke eĉ kiam ekzistis lernejoj, ili havis specialistan karakteron, kutime por eduki pri skribado aŭ sacerdoteco, sekve edukado estis ĉefe tasko de la gepatroj. La familio devis transdoni la kulturen heredon de la socio de unu generacio al alia.

Krome, ni memoru ke la kleruloj de la gravaj akademioj ankaŭ konservis kaj verkis literaturon, speciale saĝecan, kaj oni uzis literaturajn verkojn kiel instrumaterialon por instrui saĝecon. La grandaj saĝuloj estis la grandaj instruistoj.

La materialo havebla permesas ke ni komprenu la organizon de lernejoj, rilate al la instruistaro kaj la pedagogiaj teknikoj.

Kvankam ni ne havas rektan ateston pri fundamentaj lernejoj en Izraelo, la fakto ke oni trovis ostrakojn kaj tabuletojn kun surskriboj pravas ke oni efektive edukis skribistojn iel. Ankaŭ, la konserviĝo de literaturo kun psalma, historia, saĝeca, aŭ kulta karaktero indikas ke ekzistis pastraj lernejoj, saĝecaj lernejoj, eĉ "Readmona" lernejo, krom la bone konataj disĉiplaroj de profetoj.

Konsiderante la enhavon de eduko, en la lernejo kaj en la hejmo kaj aliloke, ni konsideris kvar fakojn larĝajn: instruado, disciplino, agronomio, metioj.

Notoj

1. G.E. Wright, *The Old Testament against its Environment*, London, 1950, p.25-6. Kp. ankaŭ la studon pri antropomorfismo de J. Hempel: "Die Grenzen des Anthropomorphismus Jahwes im Alten Testament," en *Z. A. W.*, 1939, p. 75s.
2. Wright, *ibid.*, p.41.
3. La mallonga verko de J.A. Thompson (kiu multe pritraktis la temon), *The Ancient Near Eastern Treaties and the Old Testament*, London, 1964, skizas la pritrakton.
4. Komprenoble, inter la antikvuloj neniu parto de la vivo estis apartigebla de religio, aŭ de superstiĉo. Sekve, kiam temis pri interligoj, oni invokis la diojn kiel atestantojn de la interligoj; kaj rilate al lernejoj, la dioj funkciis kiel patronoj.
5. Religi-filozofia movado interkultura, antikva.
6. Por originalaj tekstoj kaj tradukoj de la multaj verzioj, vidu F.C. Conybeare, J. Rendel Harris, kaj Agnes Smith Lewis: *The Story of Ahikar*, Cambridge, 2a eldono, 1913. Por nur traduko, vidu F. Nau, *Histoire et Sagesse d'Ahikar l'Assyrien*, Paris, 1909.
7. Ne estas klare, en la difekta Asŭan-arama teksto, ke Nadan estis adoptita; sed estas klare en la siria teksto.
8. Citoj laŭ Conybeare k.a., (v.noton 6), p.102, 109, 122, siria verzio. Ekzistas interesa kritiko pri Nadan, en kelkaj tekstoj, kiu komparas lin kun porkoj kiuj iris rekte el bano al odoraĉa ekstremeĵo. Ŝajne pri tio temas la mencio en 2 Petro 2:22. Nadanon oni edukis, sed lia karaktero ne ŝanĝiĝis.
9. Vidu S. N. Kramer, *The Sumerians*, Chicago, 1963, p.243-246.
10. E. R. Dalglisch, *Psalm Fifty-one*, Leiden, 1962, en kiu li

notoj

- trovas klarajn similecojn inter la izraelaj kaj mesopotamiaj formoj kaj ideoj.
11. *Ibid.*, p.249. Driver konkludas dirante: "Oni sekve devas atenti la komunajn instinktojn de la homaro." Li, do, esprimas la doktrinon pri "arketipoj" originitan de la psikologo Jung, kiu diras ke kelkaj bildoj apartenas al la "kolektiva malkoncio" de la homaro.
 12. *The Psalms in Israel's Worship*, Oxford, 1962, volumo 1, p.52-3, 56-7. Mowinkel ne reprezentas la ekstreman formon de skandinaviaj studoj, kiun oni nomas "skemismo" kaj kiun proponas la "Upsala skolo."
 13. *J.S.S.*, 1956, p.358-9.
 14. La rolon de la Kanaanidoj (kaj Ĥurianoj) kiel perantoj de egiptaj kaj mesopotamiaj ideoj ne nur al Izraelo sed ankaŭ al la egeaj landoj oni konstante pli lernas, speciale pro la trovoj ĉe Ugarit. Ni ankaŭ memoru ke la hebrea tradicio rakontas pri almenaŭ du gravaj kontaktoj inter Izraelo kaj Egipto (la Eliro kaj la epoko de Salomono), kaj Izraelo kaj Mesopotamio (epoko de Abraham, kaj la ekzilo de la 5a jarcento).
 15. J.A.Wilson, *A.N.E.T.*, p.432-4, "Satiro pri Metioj." "Ĥetj (aŭ Aĥtoj), filo de Duauf, skribisto de la Faraono Amenemhat I (ĉ. 1991-1962 a.K.), kiu estis, ŝajne, edukisto, politika propagandisto, kaj poeto." K.A.K. Kitchen en *N.B.D.*, p.849a.
 16. J.A.Wilson (noto 15), p.432. Vidu ankaŭ H. Brunner, *Altaegyptische Erziehung*, p.159-60. Krom la "Libro-lernejo" ni legas pri la "Vivo-domo," "lernejoj" de la templo kie oni verkis, kopiis, kaj instruis sanktajn librojn kaj magian literaturon. (*Ibid.*, p.28-32). Li ankaŭ mencias instruistajn pastrojn.

notoj

17. Vidu Brunner (noto 16), p.10-32.
18. *Ibid.*, p. 11-13.
19. Vidu J.A. Wilson, *A.N.E.T.*, p. 432a, n.4.
20. H. Brunner (noto 16), p.10-11, 37.
21. *Ibid.*, p.40-42 pri "Soziale Herkunft und soziale Aussichten."
22. *Ibid.*, p.65s.
23. Utila kompara tabelo estas en *A.N.E.T.*, p.424, n.46. Vidu ankaŭ B. Couroyer: "L'origine égyptienne de la Sagesse d'Amenemopé," en *R.B.*, 1963, p. 208-224.
24. *A.N.E.T.*, p.421-424.
25. *Ibid.*, p.414-418.
26. Brunner, p.56-65.
27. Kiel pri la instaduo de Ĥetj, nomita "Satiro pri Metioj" de J.A. Wilson.
28. Vidu B. Gemser, "The Instructions of Onchsheshonqy and Biblical Wisdom Literature," en *Supplements to Vetus Testamentum, Congress Volume Oxford 1959*, Leiden, 1960, p.102-128.
29. Komenco de "La Instruoj de la Viziero Ptah-Hotep," en *A.N.E.T.*, p. 412-14.
30. Vidu J. A. Wilson, *The Burden of Egypt*, Chicago, 1951, p.299-304; kaj H. Brunner, p. 116-126.
31. L. Duerr, *Das Erziehungswesen im Alten Testament und im antiken Orient*, Leipzig, 1932, p.66.
32. *Ibid.*, p.67-8.
33. *A.N.E.T.*, p. 72.
34. *Ibid.*, p.174-5.
35. Pri *ummanu* (sumere: *umnia*) vidu G. R. Driver, *Semitic Writing*, London, 1954, p.65, n. 10.
36. *A.N.E.T.*, p.490.
37. Vidu C. J. Gadd, *Teachers and Students in the Oldest Schools*, London, 1956, p. 14-16.

notoj

38. Vidu S. N. Kramer, *The Sumerians*, p. 105-9 kaj 340-42 por kompleta traduko. Sumera *engar* eniris la semidajn lingvojn, per akada *ikkaru*; ekz., en Amos 5:16 ni trovas אכר.
39. G.R. Driver (noto 35), p.65-6, citanta asirian tekston en kiu estas dialogo inter instruanto kaj lernanto.
40. W. G. Lambert, *Babylonian Wisdom Literature*, Oxford, 1960, p.259; ankaŭ Driver, p.1.
41. Por utila kompilo de la "eseoj de la skrib-domo," vidu C. J. Gadd (noto 37), p.27-37. S. N. Kramer listas kvin el ili, nun plene aŭ grandparte utiligeblaj: (1) "Lerntagoj," nome, priskribo pri vivo en lernejo, de "filo de la lerndomo" (*dumu edubba*); (2) "Skribisto kaj lia perversa filo," plejparte lamento de patro; (3) "Kontrolisto (*ugula*) kaj la Skribisto," *Streitgedicht*; (4) "Enki-mansi kaj Girini-îšag," kolera debato inter "filo de la lerndomo" kaj "granda frato," (*šeš gal*), probable pli aĝa studento kiu rolis kiel instruanto; (5) eseo pri la Edubba kiel la "lern-domo." Vidu "Sumerian Literature, a General Survey," en G. E. Wright (red.), *The Bible and the Ancient Near East*, London, 1961, p.257-8.
42. *Ibid.*, p.260, n.9.
43. *Op. cit.*, p.62, n.4.
44. Vidu "Der Sohn des Tafelhauses," en *Die Welt des Orients*, 1948, p.172-186, speciale p.185-6. Kp. J.J.A. van Dijk, *La Sagesse Sumero-accadienne*, Leiden, 1953, p.22.
45. T. Jacobsen, en Frankfort k.a., *Before Philosophy*, Penguin Books, 1949, p.201-4.
46. Vidu T.B. Jones kaj J. W. Snyder, *Sumerian Economic Texts from the 3. Ur Dynasty*, Minneapolis, 1961.

notoj

Sur p.223s. ni trovas mencion pri "magazeno" por mortintaj bestoj, por kiu oni nomis la vorton Edubba! La verkistoj ankaŭ notigas ke la skribistoj uzis detalan sistemon de librotenado.

47. C. J. Gadd, (noto 37), p.20.
48. *Ibid.*, p.35. Probable temas pri minaco, kaj ne pri vera ago. Komparu la verzion de Kramer: "Se mi efektive farus mian volon pri vi, . . .mi unue batus vin. . . .ligus viajn piedojn per kupraj ĉenoj kaj ŝlosus vin en la domo. . . ." S. N. Kramer (noto 38), p.242-3.
49. C.J.Gadd (noto 37), p.16; J. J. A. van Dijk (noto 44), p.23-25.
50. *Loc. cit.*
51. *Op. cit.*, p.18.
52. *Ibid.*, p.33-4.
53. Vidu A. S. Kapelrud, *Baal in the Ras Shamra Texts*, Kopenhago, 1952, p.17.
54. En ĉapitro pri "Lernejoj por studi la parolan Toran," B. Gerhardsson diskutas la judajn lernejojn, en *Memory and Manuscript*, Upsala, 1961, p.85-92. Li ankaŭ diskutas la fundamentan biblilernejon (bet seper) sur p.56-66 de la sama verko.
55. S. Mowinckel, en *W. I. A. N. E.*, p.206-7, esprimas tiun opinion, kaj nomas aliajn kiuj akordas. Aliloke, li sugestas ke la Jahŭisto estis membro de tiu supozata akademio: "Da J ein schreibkundiger und gelehrter Mann, ein 'Weiser' war, so hat er gewiss auch mit der Schreiberschule des Tempels und des Hofes in Verbindung gestanden. . . . Die Gelehrsamkeit der Schreiberschule umfasste nicht bloss Maschaldichtung, sondern auch die sprachlichen und geschichtlichen Kenntnisse, die fuer die politische und diplomatische Korrespondenz des Koenigs notwendig waren. . . ." "Erwaegungen zur Pentateuchquellen-

notoj

- frage," *Norsk Teologisk Tidsskrift*, 1964, p.1-138. Vidu speciale "Das Milieu des Verfassers J," p.55s.
56. Vidu J. Bowman, *The Gospel of Mark. The New Christian Jewish Passover Haggadah*, Leiden, 1965.
57. W. Barclay, *Educational Ideals in the Ancient World*, London, 1959, p.22-3.
58. Vidu S. Moscati, *L'epigrafia ebraica antica*, 1935-50, Roma, 1951, p.8-26. Vidu la tradukon de Albright en *A. N. E. T.* p.320. Du aliaj studoj estas de J. B. Segal, "'Yrñ' in the Gezer 'Calendar,'" *J. S. S.*, 1962, p.212-21, ("listo fiksita al muro"); kaj B. D. Rahtjen, "A Note Concerning the Form of the Gezer Tablet," en *Palestine Exploration Quarterly*, 1961, p.70-72 ("tabuleto de lernanto").
59. *D. O. T. T.*, p.201-3.

NELONGA NOTO: LA DATOJ DE JESUO

de Donald Broadribb

La evangelioj ne tute klare prezentas la datojn de Jesuo, Mi opinias ke ni povas solvi la problemon se ni ekzamenas ilin unuope.

Luko: laŭ Luko 2, Jesuo naskiĝis

Dum la regado de Herodo

Herodo "la granda" regis 40 a.K. - 4 a.K.

Herodo Arĥilao regis 4a.K. - 6 p.K.

Dum Quirinius (Kirenio) regis Sirion

Quirinius regis ek de 6p.K.

Dum la Cezaro estis Augustus (Aŭgusto)

Cezaro Augustus regis 27a.K. - 14p.K.

Kiam Quirinius registris la popolon

Quirinius registris en 6p.K.

konkludo: Jesuo naskiĝis en la jaro +6 (6p.K.)

Mateo: laŭ Mateo 2, Jesuo naskiĝis

Dum la regado de Herodo "la granda"

Herodo "la granda" regis 40a.K. - 4a.K.

Antaŭ la regado de Herodo Arĥilao

Herodo Arĥilao regis 4a.K. - 6p.K.

Kiam okazis astra fenomeno kun astrologia gravo

Konjunkcio de Jupitero (planedo kaj simbolo de la justeco) kaj de Saturno (simbolo de Izrael) en la signo Fiŝoj okazis 7a.K.

konkludo: Jesuo naskiĝis en la jaro -7 (7a.K.)

La malakordo estas de 10 jaroj (7a.K./6p.K.). La probable ekspliko estas ke la evangeliistoj ne sciis la jaron de la naskiĝo de Kristo. La evangelioj laŭ Luko kaj Mateo verkiĝis je proks. 80-90 p.K., kaj skribaj dokumentoj pri naskiĝdatoj

Datoj de Jesuo

ne ekzistis por palestinanoj tiam. Mateo konsultis astrologion, trovis la daton 7a.K., kaj ĉar li nur sciis ke Jesuo naskigis dum regis Herodo, li supozis ke temas pri Herodo la Granda. Luko, kutime relative fidebla pri datoj, sciis ke la naskiĝo okazis dum regis Herodo, sed supozis ke temas pri Herodo Arĥilao.

La Predikado de Jesuo

Nur Luko 3:1-2 informas pri la dato: Jesuo komencis sian karieron *post* Johano la Baptisto estis enkarcerigata (3:19-21). Johano komencis sian karieron tiam:

Dum la 15a jaro de Cezaro Tiberius	29p.K.
Dum regis Pontius Pilato Judujon	26-36p.K.
Dum regis Herodo Galileon	4a.K.-39p.K.
Dum Filipo regis Iruteon	4a.K.-34p.K.
Dum Lysanius regis Abilenon	?
Dum Annas kaj Caiaphas estis ĉefpastroj	
Annas =	6-15p.K.
Caiaphas =	18-36p.K.

Konkludo: Johano la Baptisto komencis sian predikadon en la jaro 29 p.K. kaj Jesuo komencis sian karieron *post* tiam, do eble en 30 aŭ 31. (Laŭ Marko kaj Mateo, *antaŭ* la enkarceriĝo de Johano).

La Morto kaj Releviĝo de Jesuo

Laŭ la sinoptikaj evangelioj, Jesuo mortis en jaro
Kiam Pasko okazis dum la vespero de ĵaŭdo
kaj la mateno kaj posttagmezo de vendredo.
Tio okazis dum du jaroj: 30 p.K., 33 p.K.

Laŭ Luko, kiam mortis Jesuo
Pontius Pilato kaj Herodo Antipas ambaŭ
regis, do 26-36p.K.

Laŭ Agoj kaj Galatoj, Paŭlo vidis la releviĝintan Kriston.
Paŭlo konvertiĝis en 33p.K.

Konkludo: La morto kaj releviĝo okazis en la jaro 33p.K. (Se ni akceptas la raporton de Luko ke Jesuo komencis prediki *post* la karceriĝo de Johano, do estis post 29 p.K., probable Johano predikis dum pli ol nur kelkaj monatoj, do Jesuo komencis sian karieron post 30 p.K.)

Resumo de la Datoj

Jesuo naskiĝis:	6p. K.
Jesuo ekpredikadis:	30p. K.
Jesuo mortis/releviĝis	33p. K.

LA AŬTOROJ

- D-ro A. Albault, Toulouse, Franclando: oftalmologo, redaktoro de *Monda Kulturo*.
- D-ro S. Billigheimer, Melbourne, Aŭstralio: rabeno emerita, kolego de Martin Buber.
- D-ro J. Bowman, Melbourne, Aŭstralio: profesoro en la Departemento de Semidaj Studoj, Universitato de Melbourne.
- D-ro D. Broadribb, Melbourne, Aŭstralio: lektoro en la Departemento de Semidaj Studoj, Universitato de Melbourne.
- D-ro A. Capell, Sydney, Aŭstralio: lektoro en la Departemento de Antropologio, Universitato de Sydney.
Brian Colless, M.A., asistanto en la Departemento de Semidaj Studoj, Universitato de Melbourne.

BIBLIA REVUO

1-4

Indekso

Redaktoro: Donald Broadribb

Adreso: Dept. of Semitic Studies, University of
Melbourne, Parkville N.2, Victoria, Aŭstralio.

BIBLIA REVUO

Indekso 1965

(*Biblia Revuo 1-4*)

Broadribb, Donald:

Carl Jung kaj la Biblio. B.R. 1, pp. 13-45

La Apostolo (T)addaj. B.R. 2, pp. 62-74.

Poezio Hebrea: Kelkaj Pensoj. B.R. 2, pp.75-88.

Poezio Hebrea: Historia Rigardo. B.R. 3, pp. 19-50.

La Epistolo al la Romanoj. B.R. 4, pp.1-82.

Capell, Arthur:

Modernaj Metodoj por la Instruado de Semidaj Lingvoj.

B.R. 2, pp. 32-61.

Görlich, Ernesto Jozefo:

Sklaveco en la Antikva Proksima Oriento. B.R. 1, pp. 46-51.

Máneek, J.:

La Novtestamenta Kanono kaj Ekumeno. B.R. 3, pp. 1-18.

Maul, Stefan:

La Mesio-Prediko de Johano-Baptisto. R.R. 2, pp.1-6.

Johano Baptisto sur la Sojlo de la Malnova al la Nova

Testamento. B.R. 3 pp.51-68.

Murtonen, A.:

Paul E. Kahle kiel Bibli-esploristo kaj Persono. B.R. 3,
pp.69-74.

Ring, Rodney:

La Komisiigo de Petro. B.R. 1, pp.52-54.

Ringgren, Helmer:

La T.N. Uppsala-Skolo kaj Ĝia Tradicihistoria Metodo

B.R. 1, pp.1-12.

Rust, George:

Dek Du Teorioj pri la Alta Kanto de Salomono. B.R. 3,
pp.7-31.

Ŝlosilo por la Apokalipso. B.R. 4, pp.7-83.

NI PETAS

Multaj pastroj kaj teologoj en Ĉekoslovakio, Pollando, Jugoslavio Hungario, Bulgario, kc. deziras aboni *Biblian Revuon* sed ne povas, ĉar ili ne povas sendi monon al la "okcidenta" administracio. Se vi abonas gazetojn aŭ aĉetas librojn el tiuj landoj (ekz. *Archiv Orientalni*, de Praha; *Acta Orientalia*, de Budapeŝto), vi helpos nin se vi kontaktos nin. Ni povos aranĝi la abonojn per nia kredito ĉe personoj dezirantaj aboni *Biblian Revuon* en tiuj landoj.

REPUBLIC OF THE PHILIPPINES
DEPT. OF PUBLIC WORKS AND COMMUNICATIONS
BUREAU OF POST
Manila

The undersigned, BARTOLOME S. REMIGIO, publisher and printer of BIBLIA REVUO published quarterly in ESPERANTO at Gen. Luna, Ibaba, Malabon, Rizal, after having duly sworn in accordance with law, hereby submits the following statement of ownership, management, circulation, etc. which is required by Act 2580, as amended by Commonwealth Act No. 201.

NAME

Editor and Owner: DONALD BROADRIBB
Address: Dept. of Semitic Studies, University of Melbourne,
Parkville N.2, Victoria, Australia
Publisher and Printer: BARTOLOME REMIGIO
Address: Gen. Luna, Ibaba, Malabon, Rizal, Philippines
Office of Publication: Gen. Luna, Ibaba, Malabon, Rizal

In case of publication other than daily, total number of copies printed and circulated of the last issue dated March, 1966.

1. Sent to paid subscribers.	100
2. Sent to others than paid subscribers	50
Total	150

(Sgd.) BARTOLOME S. REMIGIO
Publisher and Printer

SUBSCRIBED AND SWORN to before me this 4th. day of Oct., 1965, at Malabon, Rizal, the affiant exhibiting his Residence Certificate No. A 4883277, issued at Malabon, Rizal, on June 4, 1965.

(Sgd.) Tiburcio Ramirez
Notary Public

Doc. 2595, Page 79, Book 31, Series of 1965.